

ISSN 0032-4361 7 1989


# 中国报道
# EL POPOLA ĈINIO



- Akvomastrumado en 40 jaroj
- Esperanto kaj mia lernado de fremdaj lingvoj
- Tetrinkejoj ŝatataj de Chengdu-aj loĝantoj







## INTER NI

Ĉi-sube estas citaĵoj el leteroj de niaj legantoj pri transskribo de ĉinaj propraj nomoj. Niaj opinioj plejparte estas inkluditaj en "Refoje pri Transskribo de Ĉinaj Propraj Nomoj" (vd. nian revuon, n-ro 1, 1989). Niaj legantoj bonvolu legi tiun artikolon kaj "Komparan Tabelon de Interrespondaj Literoj" (vd. nian revuon, n-ro 2, 1989).

**La Red.**

La nova EPĈ estas bonega! Bela, enhavoriĉa kaj interesa. Mi multe ŝatas vian decidon ekde nun uzi la hanlingvan fonetikan alfabeton kiam vi transskribas ĉinajn nomojn. Sed kial vi ne uzas la internacian sistemon por transliterumi rusajn nomojn? (Ni literumis rusajn nomojn laŭ transskribo fare de sovetiaj esperantistoj. — **La Red.**)

**HALDO VEDIN** (Svedio)

Surprizo. Nova teknika formo, enhaveco, koloraro ktp. Surprizo por laŭdo.

Sed kial en numero 1/89, Yangzi-rivero anstataŭ Jangzi-rivero kiel ĝis nun, Xilinguole anstataŭ Ŝjilingŭole.

Esperanto estas Esperanto. Reciproka kompreno, simpla, sed ne komplika.

**TOMISLAV MITROVIĈ** (Jugoslavio)

Mi legas n-ron 1/1989 de la revuo kaj mi ne estas tre feliĉa pri la nova transskribo de kelkaj propraj nomoj, ĉar ili ne plu estas en Esperanta lingvo. La revuo estas Esperanta revuo, sed ne angla revuo, kaj ankaŭ en Esperanto ne ekzistas W, Y, X, SH, sed nur 28 literoj, kiuj povas grupiĝi inter si por formi ĉiujn ajn prononcojn.

**RENE BILLOT** (Francio)

Sur revenvojo Foto de **WANG XUDONG**

MONATA GAZETO ELDONATA DE ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. KESTO 77, BEIJING, ĈINIO

# ENHAVO


12 **Gvidanto, mentoro kaj amiko**
6 **Akvomastrumado en 40 jaroj**
54 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (31):
En la naskoloko de la unua tekstilejo de Ĉinio
16 **Vizito al la Pekina Denunco-centro**
23 **Novaj eltrovoj de ĉinaj arkeologoj**
44 Tibetana mezlernejo en Pekino
38 La Hebei-opera Trupo turneanta en montaro
59 ĈINAJ ARTOJ:
Ĉinaj figuropentraĵoj (II)
32 Du poemoj
32 Mazdaĵetoj
33 Resaniga medicino leviĝas en Ĉinio
35 **Antikva ĉigong-terapio**
37 ĈINA MEDICINO:
Ĉinmedicina prevento kaj kuracado de oftaj malsanoj (II)
47 Kial malaperis la klara fluo de la antikva kanalo?
18 FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:
**Tetrinkejoj ŝatataj de Chengdu-aj loĝantoj**
50 Kuriozaj klinitaj turoj
30 KURANTAJ AFEROJ
28 LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ:
Esperanto kaj mia lernado de fremdaj lingvoj
52 SUR NIA LIBROBRETO:
Bilanco omaĝa al Ludovikito
51 POR KOMENCANTOJ:
Instruistino
53 ESP-NOVAĴOJ
4 INTER NI
31 KORESPONDI DEZIRAS


SUR LA KOVRILO:
Foiro en suda Ĉinio
Foto de **ZHAO TIANLU**


2 Guilin, urbo kun pejzaĝoj plej belaj en Ĉinio


Foto de **GAO MINGYI**

Guilin en la nordorienta parto de la Guangxi(-Gŭangŝji)-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono estas mondfama turisma loko. Ĝin ĉirkaŭas groteskaj montpintoj kaj preterfluas la bela Lijiang(Liĝjang)-rivero. Ambaŭborde de la rivero inter Guilin kaj Yangshuo ravas pentrindaj pejzaĝoj 50 km. longaj.


Sur revenvojo
Foto de **WANG XUDONG**

ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:
Sur stepo Pentraĵo de **ZHOU RONGSHENG**

SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Moskeo Angaĝi de Tabriz, Irano
de **ŜAHROĤ FARZAD** (Irano)
Pejzaĝo de Pakistano
de **SMAIL GRBO** (Jugoslavio)

## LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Chengdu
2. Hangzhou
3. Wuxi
4. Hexian-gubernio
5. Yingkou-gubernio
6. Zhengzhou
7. Wuhan
8. Taiwan-provinco
9. Gansu-provinco



# AKVOMASTRUMADO EN 40 JAROJ

Teksto de ZHANG XUEJIAN*

Fotoj de HAN XUEZHANG


LA vasta Ĉinio havas multe da riveroj, inter kiuj ĉefaj estas Yangzi-rivero, la Flava Rivero, Heilong- kaj Perlo-riveroj. Ili interplektiĝas kiel araneaĵo, nutras kreskaĵojn kaj faras la ĉinan teritorion riĉa oazo. Tamen iuj riveroj ofte inundas kaj estas malfacile kvietigeblaj. En la historio la Flava Rivero estis nomata malutila rivero. En du mil jaroj ĝi furiozis 1 500-foje, ŝanĝis sian fluejon 26-foje kaj inundis areon de 250 000 kvadrataj kilometroj. En 1931 Yangzi- kaj Huaihe-riveroj samtempe leviĝis, inundis 8.4 milionojn da hektaroj da kampoj kaj dronigis 220 000 loĝantojn. Post sia fondiĝo en 1949 la nova Ĉinio faris multajn aferojn en akvoutiliga konstruado kaj ekspluatado de akvaj riĉfontoj.


## BRIDI RIVEROJN KAJ MALHELPI INUNDON

En la pasintaj 40 jaroj oni riparis 170 000 km. da digoj, dragis 100 000 km. da rivervojoj kaj konstruis 86 000 akvorezervejojn. Tio regis parton da akvokvanto de riveroj kaj kreis kondiĉojn por malhelpi inundon kaj utiligi akvon.

Huaihe estas la unua rivero ĉiuflanke reordigita post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Ĝi fontas el Tongbai-monto en la provinco Henan kaj trafluas Henan-, Anhui- kaj Jiangsu(Ĝjangsu)-provincojn, kun longeco de ĉ. 1 000 km. En 1950 la ŝtato faris decidon bridi Huaihe-riveron. En la lastaj 40 jaroj oni konstruis 5 200 akvorezervejojn kun totala kapacito de 35.8 miliardoj da kubmetroj. La ŝtato investis 7.6 miliardojn da juanoj por kvietigi Huaihe-riveron. Nun la baseno de Huaihe-rivero ne plu suferas superakvon en pluvaj tagoj kaj sekegecon en senpluvaj tagoj. Yangzi-rivero estas la plej granda rivero de Ĉinio. La ekonomio en la basenoj de ĝiaj meza kaj malsupra partoj estas prospera. Ĉe Yangzi-rivero kaj ĝiaj branĉoj oni konstruis kontraŭinundajn digojn kaj inunddividajn kaj inundretenajn konstruojn kaj levis la kapablon ellasi inundon. En 1954 furiozis Yangzi-rivero, kaj la urbo Wuhan en ĝia meza baseno estis minacata de la inundo. Sed Wuhan kaj 670 000 hektaroj da kampoj restis sekuraj, ĉar la supre menciitaj konstruoj bone ludis sian rolon. Por solvi la problemon de inundo de la Flava Rivero, oni trifoje en la pasintaj 40 jaroj fortikigis la digojn kaj por tio la ŝtato investis 3.3 miliardojn da juanoj. En 1958 en Huayuankou de la urbo Zhengzhou (Ĝenĝoŭ) okazis eksterordinara superakvo. La akvonivelo altiĝis ĝis la supro de la digoj de la Flava Rivero kaj la Zhengzhou-a Ponto super la Flava Rivero estis detruita. Tiaokaze miliono da kamparanoj laboris por fortikigi la digojn ambaŭflanke de la rivero kaj garantiis ilian sekurecon. En 1963 okazis superakvo de Haihe-rivero en norda Ĉinio, kia ne estis vidita en la pasintaj cent jaroj. Post urĝa dreno de la akvo oni sekurigis la urbon Tianjin (Tjanĝin). Ankaŭ ĉe la riveroj Perlo, Liaohe, Songhua kaj Heilong oni faris multe da regaj konstruoj kaj altigis la kontraŭinundan kapablon.

La akvomastrumaj konstruoj ne nur malhelpas inundon, sed ankaŭ liveras akvon al urboj kaj industriaj entreprenoj. Por solvi la problemon de akvo por Tianjin, septembre de 1983 oni enkondukis akvon de Luanhe-rivero en tiun urbon, kompletiginte grandiozan konstruon. Por solvi la saman





Irigaciaj kanaloj malsupre de Miyun-akvorezervejo

Irigacio per akvo ventopumpita en regiono sude de Yangzi-rivero



problemon por la marborda urbo Dalian en nordorienta Ĉinio, oni faris konstruon por enkonduki akvon de Biliu-rivero en tiun urbon kaj atingis la celon en 1983.

## ENKONDUKI AKVON POR IRIGACII KAMPOJN

Fakuloj opinias, ke krom inundo la plej granda minaco al la ĉina agrikulturo estas sekeco. Ĉiujare en la pasintaj 40 jaroj ĉ. 20 milionoj da hektaroj da areo en Ĉinio estis atakataj de sekeco. La plagita areo konsistigas 19% de la totala agraro de la lando. La produktokvanto de greno reduktiĝis je almenaŭ miliono da kg. pro sekeco. Sekve, starigo de akvoutiligaj konstruoj kaj enkonduko de akvo por irigacii kampojn estas gravaj rimedoj por pliigi la agrikulturan produktokvanton.

La diligenta kaj kuraĝa ĉina nacio frue faris multe da irigaciaj konstruoj. La akvoutiliga konstruo Dujiangyan (Duĝjangjan) en okcidenta Sichuan-provinco, kiu estis farita en la 3-a jc. a.K. por irigacii Chengdu-ebenaĵon, estas ekzemplo kaj nun ankoraŭ ludas sian rolon.

En la pasintaj 40 jaroj oni rekonstruis diversajn antikvajn irigaciajn konstruojn por levi la irigacian efikon. Samtempe oni investis multe da mono por fari grandan nombron da novaj irigaciaj konstruoj. Tiuj konstruoj dividiĝis en tri specojn.

La unua estas, ke oni akumulis pluvon en montregiono per akvorezervejoj por irigacii grandan areon da kampoj. Ekz. en la provinco Anhui oni konstruis la grandajn akvorezervejojn Foziling, Meishan, Xianghongdian (Ŝjanghongdjan) kaj Mozitan kaj multajn mezkaj malgrandajn akvorezervejojn. Oni faris ankaŭ la grandan irigacian konstruon Pishihang kaj fosis grandajn kanalojn, kiuj formis irigacian sistemon kun areo de efika irigacio de 540000 hektaroj kaj garantias riĉan rikolton en sekaj tagoj en la regionoj de Lu'an, Chaohu kaj Hefei.

La dua estas, ke oni faris grandan akvokondukan konstruon. La akvaj riĉfontoj de la provinco Jiangsu estas abundaj sude kaj malabundaj norde. Pro akvomanko reduktiĝis la produktokvanto de agrikulturo en norda Jiangsu. Por ŝanĝi tiun staton, komence de 1961 oni faris konstruon konduki akvon de Yangzi-rivero al nordo. Kun la Jiangdu-a pumpstacio ĉe Yangzhou (Jangĝoŭ) kiel centro, ĝi havas 8 pumpajn ŝtupojn laŭ la Pekin-Hangzhou-a Granda Kanalo, kiuj kunligiĝas kun interkruciĝantaj irigaciaj akvoduktoj kaj formis irigacian reton. En la dumlonge sekega regiono de norda Jiangsu nun ĉie estas riverakvo, kiu povas esti kondukita nordorienten al la marborda urbo Lianyungang kaj nordokcidenten al la grava industria urbo Xuzhou (Ŝjuĝoŭ). La sukceso ebligis al Xuhuai(Ŝjuhŭaj)-regiono plimultigi la rizkampojn de 130000 hektaroj al 660000 hektaroj kaj ŝanĝis la situacion transporti grenon de sudo al nordo.

La tria estas, ke oni boris 2.3 milionojn da motorpumpaj putoj en sekaj nordaj regionoj, 20-30-oble kiom tiuj en 1949. En ĉiuj nordokcidentaj provincoj oni faris multe da grandaj pumpirigaciaj konstruoj, kiaj la konstruo pumpi akvon de la Flava

Ŝpruca irigacio



Rivero kaj konduki akvon de Weishui-rivero en Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco kaj la irigacia konstruo de Jingxi (Ĝingŝji) kaj Xicha (Ŝji-ĉa) en Gansu-provinco. Ili ludis pozitivan rolon en akiro de riĉa rikolto en tiuj lokoj.


En la pasintaj 40 jaroj la areo de la irigaciataj kampoj de Ĉinio kreskis de 16 milionoj da hektaroj en la komenca periodo post la fondiĝo de la popola respubliko al 48 milionoj da hektaroj. En 1949 la tutlandaj rizkampoj kovris 20 milionojn da hektaroj, el kiuj duono dependis de natura pluvo kaj ne havis irigacian instalaĵon. Kaj nun la tutlandaj rizkampoj jam atingis 33 milionojn da hektaroj. Kvankam la irigaciata areo en Ĉinio konsistigas apenaŭ duonon de la totala agraro, tamen la grena produktokvanto en la irigaciataj lokoj okupas 2/3 de la totala grena produktokvanto de la lando.

## EKSPLUATADO DE AKVAJ RIĈFONTOJ

La akvaj riĉfontoj de Ĉinio estas abundaj. En la pasintaj 40 jaroj oni konstruis ĉ. 90 000 grandajn, mez- kaj malgrandajn hidroelektrejojn kun totala generatora kapacito de 31.61 milionoj da kW. Sur diversaj riveroj oni sukcese faris grupon da ĉefaj hidroelektraj konstruoj, inkluzive de 21 grandaj hidroelektrejoj, ĉiu kun generatora kapacito de pli ol 250 000 kW, el kiuj Gezhouba(Geĝoŭba)-hidroelektrejo baranta Yangzi-riveron estas la plej granda pivota akvoutiliga konstruo. La totala kapacito de ĝiaj 21 generatoroj estas 2.715 milionoj da kW. En la pasintaj 7 jaroj oni ĝin konstruis, ekipis kaj uzis samtempe. Ĝi produktis sume 60 miliardojn da kW da elektro ĉiuhore kaj donis al la ŝtato 2.4 miliardojn da juanoj kiel imposton.

Nun Ĉinio konstruas 17 grandajn hidroelektrejojn kun generatora kapacito de ĉ. 6.6 milionoj da kW. Tamen, kompare kun la abunda rezervokvanto de la akvaj riĉfontoj, la ĝenerala ekspluatado en Ĉinio estas ne sufiĉa (oni ekspluatis nur 5% de la riĉfontoj). Por multe utiligi akvajn riĉfontojn, Ĉinio ellaboris grandiozan planon pri hidroelektra konstruado. Sur la bazo de generatora kapacito de 20.32 milionoj da kW kaj elektra produktokvanto de 58 miliardoj da kWh en 1980, ĝi atingos la celon havi generatorojn kun kapacito de 80 milionoj da kW kaj jaran elektran produktokvanton de 250 miliardoj da kWh en la fino de la kuranta jc. Laŭ tiu plano, Ĉinio ekspluatos ĉefe Hongshui-riveron, la supran Flavan Riveron, la supran kaj mezan Yangzi-riveron kaj Lancang-riveron. ■

*La aŭtoro estas laboranto de la Akvomastruma Ministerio de Ĉinio.




Pengshan-akvorezervejo en Yulin, Guangxi



Hidroelektrejo en Shaoxing, Zhejiang





Daheiting-akvorezervejo kaj ĝiaj irigaciaj kanaloj



Ŝtupar-kampoj irigaciitaj

Akvedukto etendiĝanta al monto










Fiŝbredado en akvorezervejo




La funebra kunveno

**FENG HUA:**

# Gvidanto, mentoro kaj amiko

LA 15-an de aprilo 1989 li ĉesis spiri en Pekino, en la aĝo de 73 jaroj.

Li, malaltastatura, portis sur si pezan taskon. De 1929 ĝis 1949, por krei novan Ĉinion, li partoprenis en multaj militoj. Li funkciis kiel estro de la Organiza Sekcio de la Ĝenerala Politika Departemento de la Milita Komisiono de la Centra Komitato (CK) de la Komunista Partio de Ĉinio (KPĈ) kaj estro de la Politika Sekcio de la 18-a Korpuso de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 li funkciis kiel la unua sekretario de la Centra Komitato de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo, la unua sekretario de la Shaaxi-(Ŝenŝji)-provinca Komitato de KPĈ, estro de la Organiza Departemento de CK de KPĈ, ĉefsekretario de CK de KPĈ kaj membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPĈ. De septembro 1982 ĝis januaro 1987 li funkciis kiel la ĝenerala sekretario de CK de KPĈ.

Lia nomo estas Hu Yaobang. La ĉina popolo intime nomas lin Yaobang.

En la revolucia agado de sesdek jaroj Hu Yaobang, fidela al la partio kaj la popolo, faris senmortan kontribuon. La tuta lando malĝojegis pro lia forpaso. En la 22-a de aprilo ĉinaj gvidantoj kaj pli ol 4 000 personoj okazigis solenan funebran kunvenon. Ambaŭflanke de la strato inter la kunvenejo kaj la kremaciejo miliono da urbanoj atendis lian funebran aŭtomobilon por saluti lin lastafoje.

Li faris neforviŝeblan kontribuon al la mondpaco kaj la amikeco inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Amikoj de multaj landoj sendis kondolencajn telegramojn kaj leterojn.

Dum lia vivo okazis multe da kortuŝaj aferoj.

Sube estas kelkaj el ili.

## MENTORO

Yaobang estis serena kaj humura. Kiam li funkciis kiel la unua sekretario de la Centra Komitato de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo, li tre amzorgis junulojn. Foje li diris al sia laboranto: "Ni devas esti aktivaj kontaktiĝi kun junuloj. Ili estas timidaj. Se ni ne estas aktivaj, ili eĉ ne volas rigardi nin."

Foje li oficvojaĝis al Guangdong-provinco. Li venis en vagonon plenan de studentoj kaj konversaciis kun ili kiel malnova amiko pri vivo, lernado kaj idealo. Post unu horo la studentoj eksciis, ke li estas la unua sekretario de CK de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo, kaj hurais de emociiĝo.

Yaobang tre atentis talentajn junulojn. Kiam la fama ĉina verkisto Liu Shaotang estis mezlernejano, iu rekomendis lin al Yaobang. Yaobang tuj sendis la ĉefredaktoron de "Ĵurnalo de Ĉina Junularo" venigi lin. Poste li instrukciis postenigi Liu en la redakcio de la ĵurnalo. Tio ludis gravan rolon por Liu en lia sukceso en verkado.

Yaobang ofte invitis junulojn en sian hejmon por havi konversacion. Ĉu pri ŝtataj aferoj, ĉu pri sia am-afero, la junuloj ĉiam ĝojis verŝi al li la koron.

Yaobang ofte edifis junulojn per siaj travivaĵoj, kondukis ilin for de ilia antaŭjuĝo kaj helpis ilin bone fari sian laboron. Kiam li gvidis la laboron de CK de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo, li zorgis aparte pri "Ĵurnalo de Ĉina Junularo" kaj donis multe da bonaj konsiloj rilate ĵurnalistikan teorion, verkadon de ĉefartikolo, raportadon, enpaĝigon kaj titol-aranĝon, ke la ĵurnalo fariĝis tre leginda.

## AMIKO DE INTELEKTULOJ

Yaobang devenis de malriĉa kamparana familio kaj ne povis fini la lernadon en mezlernejo. En la aĝo de 14 jaroj li aliĝis al la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo. Li pasigis duonon de sia vivo en militaj jaroj, dum kiuj li kaptis liberan tempeton por legi. Post la naskiĝo de la nova Ĉinio li estis ŝarĝita per multe da laboroj, tamen ankoraŭ kaptis tempon por legi librojn. Li estimis la sciojn kaj ankaŭ la intelektulojn.

En 1975 li estis komisiita gvidi la Ĉinan Akademion de Sciencoj. Tiam la "kultura revolucio" (1966-1976) ankoraŭ ne finiĝis, la scioj malpli valoriĝis kaj la intelektuloj estis humiligitaj. Tuj kiam Yaobang venis al la Ĉina Akademio de Sciencoj, li komencis enketi pri la vivkondiĉoj de la personaro okupiĝanta pri scienca esplorado en diversaj branĉoj de la akademio. En la enketado li sciiĝis, ke iliaj loĝejoj estas tro malvastaj, iliaj salajroj tro malaltaj, kaj multaj ne povas vivi kune kun sia edz(in)o, kiu loĝas aliloke kaj ne povas fariĝi loĝanto de Pekino pro la registara limigo de loĝantara ekspansio. kresko. Yaobang ĉiamaniere klopodis por solvi la problemojn. En kvar monatoj, dum kiuj li laboris en la akademio, li solvis la problemon de disiĝo de 400

Hu Yaobang raportis en la Dua Tutlanda Kongreso de la Ĉina Nov-demokratia Junulara Ligo junie de 1953.



Hu Yaobang en Yan'an dum la Kontraŭ-japana Rezistmilito (1937-1945)





Hu Yaobang en la hejmloko de Ŝekspiro en 1986

geedzaj paroj.

En la batalo kontraŭ "dekstruloj" en 1957 multaj intelektuloj estis maljuste atakitaj. Yaobang tre ĉagreniĝis pro tio. Li propetis multajn pro tiuj misatakitoj por protekti kiel eble plej multajn senkulpulojn. Post la finiĝo de la "kultura revolucio" Yaobang funkciis kiel estro de la Organiza Departemento de CK de KPĈ. Dum tiu tempo li organizis kaj gvidis la renverson de la maljustaj verdiktoj por la misatakitaj "dekstruloj" kaj misakuzitoj en la "kultura revolucio" kaj restarigis ilian reputacion.

Hu Yaobang kaj famaj ĉinaj verkistoj Bakin (dekstre) kaj Zhang Guangnian (meze)




## ORGANIZANTO DE GRAVA DISKUTADO

En 1976 la dekjara plaga kaoso estis finita, kaj la Komunista Partio de Ĉinio komencis forigi la kaoson kaj korekti siajn erarojn. Tiam rigida estis la ideologio de iuj komunistoj kaj eĉ de iuj plej altaj gvidantoj, potenca estis la forto persisti en la eraraj principoj ellaboritaj en la antaŭaj dek jaroj kaj daŭre imitata estis la antaŭa persona kulto. Tiuj personoj rigardis la erarajn teorion kaj ideologion de la gvidanto kiel absolutan veron kaj ne kuraĝis korekti ilin. Ĉe tiu historia turnopunkto estis nepre necese profundigi la teorian konon de la popolo por liberigi ĝian penson. Tiu tasko destinite falis sur Yaobang, sekretarion de la partikomitato kaj direktoron de la Lernejo de CK de KPĈ.

En la lernejo li iniciatis teorian periodaĵon, kiu kuraĝe sentabuigis multajn temojn de teorio, kaj tio grave influis la tutan partion. La artikolo "Praktiko Estas la Unika Kriterio por Pruvi la Veron", kiun oni skribis sub la gvido de Yaobang, unue publikiĝis


Hu Yaobang sur Huanglong-monto de Sichuan en 1985, kie li estis dum la Longa Marŝo antaŭ 50 jaroj



en tiu periodaĵo kaj poste reaperis en diversaj influaj ĵurnaloj. Kaj la levita diskutado pri la kriterio de la vero daŭris unu jaron kaj naŭ monatojn.

## HONESTA HOMO

Yaobang naskiĝis en la kamparo de Liuyang-gubernio de Hunan-provinco. De kiam li dediĉis sin al la revolucio, li nur unu-foje vizitis sian hejmlokon. Kvankam kun alta rango, li neniam donis apartan favoron al sia hejmloko kaj siaj parencoj.




Hu Yaobang en la Panzhihua-a Ŝtala Kompanio

En la Sesa Plena Sesio de la 11-a Centra Komitato de KPĈ en 1981 Yaobang estis elektita kiel prezidanto de CK de KPĈ. Tuj en la nokto li komisiis al sia sekretario telefoni al lia hejmloko Zhonghexiang (Ĝongheŝjang) en Liuyang-gubernio, ke la samlokanoj ne eksplodigu petardojn kaj ne festu lian promociiĝon, kaj ke la frato ne faru diskurson. Kiam li enoficiĝis kiel ĝenerala sekretario de CK de KPĈ, li difinis kelke da reguloj, nome liaj parencoj ne venu al Pekino por peti lian favoron, nek prenu lin kiel ŝildon. Li ofte diris al siaj hejmlokanoj: "Mi estas la ĝenerala sekretario de la tuta partio, sed ne de la hejmloko, kaj ne devas aparte favori la hejmlokon."

En 1982 ŝtatoficisto Xu, kiu iam laboris ĉe Yaobang, donis al nevo de Yaobang laboron en urbo. Informiĝinte pri tio, Yaobang diris al Xu: "Kara amiko, via afableco fakte ne helpis min, sed embarasis min." Xu nur povis rekamparanigi lian nevon. La pliaĝa frato de Yaobang plendis, ke ĉi tiu tute forĵetis la fratecon, kaj kverelis kun li. En la sekvanta jaro la frato komprenis lin kaj venis al li por repaciĝi. Yaobang tre ĝojis: "Diru al via infano, ke li pene laboru por akiri sukcesojn kaj gastu ĉe mi tiam, kiam li fariĝos modela laborulo." ■

Hu Yaobang kaj tibetaj studentoj de la Ŝanhaja Dramaturgia Instituto





CHEN BAOHE:

# Vizito al la Pekina Denunco-centro



Registro de denuncaj leteroj

DUM la reformado ekonomiaj krimoj jam fariĝis serioza problemo en la ĉina socio. Laŭ la statistiko de la justico, en 1988 okazis en Ĉinio pli ol 940 mil ekonomiaj krimoj, inter kiuj 60 mil estis grandaj kun monsumo de minimume dekmil juanoj, iuj eĉ kun monsumo de miliono da juanoj. Estas maltrankvilige, ke kompare kun la pasintaj jaroj leviĝis la proporcio de kontraŭleĝaj ekonomiaj agoj far ŝtataj oficistoj, fabrikestroj kaj direktoroj. Ili ne nur malhelpis la normalan ekonomian vivon, sed ankaŭ damaĝis la aŭtoritaton de la registaro kaj malhelpis la reformadon.

Ĝuste sub tiu cirkonstanco Ĉinio starigis denunco-sistemon kun la celo denunci ŝtatajn oficistojn pri iliaj kontraŭleĝaj agoj. La "Reguloj pri Denunca Laboro de la Popola Prokurorejo" publikigita de la Supera Popola Prokurorejo de Ĉinio metis sur la unuan lokon la denuncon kontraŭ ŝtataj oficistoj pri iliaj malversacio kaj koruptiĝo.

Pekino komencis starigi denunco-organizojn en la lasta aŭgusto. Nun jam fondiĝis la Pekina Denunco-centro kaj 25 denunco-stacioj en la urbo.

En la centro laboras 13 oficistoj. Guo Minzhong (Gŭo Minĝong), vicestro de la centro, konigis al mi, ke oni denuncas per telefono, letero kaj vizito. Laborante, la denunco-organizoj de diversaj niveloj devas serioze noti kaj analizi denunco-enhavon kaj prezenti

Laboranto kaj denuncanto



siajn opiniojn pri la traktado kaj samtempe fari koncernan enketon. Post la enketo ili devas sciigi la rezulton de la trakto al la denuncanto. Kaj plie, la diversaj denunco-organizoj devas strikte observi la regularon por protekti la denuncantojn. Estas absolute malpermesite malkaŝi la denuncanton kaj denunco-enhavon, eĉ interne de la denunco-organizo nur la koncernaj gvidantoj kaj laborantoj rajtas scii pri ili.

Guo diris al mi ankaŭ, ke ĝis la fino de februaro de la kuranta jaro oni ricevis 3 583 denuncojn, el kiuj 1 726 estas pri kontraŭleĝaj ekonomiaj agoj de proksimume mil diversnivelaj oficistoj, inkluzive de cent buroaj kaj departementaj kaj du pli altrangaj.

Oni nepre devas bone analizi denunco-enhavon, ne ĉiuj denuncitoj estas krimuloj. Iuj denuncantoj ne sufiĉe ekzakte konas la fakton, sekve tio facile estigas misdenuncon. Agoj de iuj denuncitoj ne estas laŭleĝaj, tamen ili ne devas esti kalkulataj kiel krimuloj, sed devas esti punataj discipline. La enketo montris, ke la nombro de oficistoj, kiuj rekte aŭ nerekte faris ekonomiajn krimojn, vere kreskis, iuj problemoj estas sufiĉe seriozaj.

Mi informiĝis de li, ke maje de 1988 la Popola Prokurorejo de la Okcidenta Distrikto ricevis anoniman leteron, kiu denuncis Song Xueliang (Song Ŝjŭeljang), la ĝeneralan direktoron de la Pekina Kampar-energia Ekspluata Kompanio, kaj Yuan Dongsheng (Jŭan Dongŝeng), la estron de la ekspluata sekcio, pri ilia ebla spekulado pri koloraj televidiloj. Post la enketado de la prokurorejo la denuncanto plurfoje telefonis al ĝi pri novaj rimarkoj. Post la profunda enketado, la kazo finfine tute evidentiĝis. Song Xueliang kaj Yuan Dongsheng kune kun iu kompanio de Guangdong-provinco en malalta prezo aĉetis 2 350 kolorajn televidilojn en la Pekina Televidila Fabriko per kontraŭleĝe aĉetita valuto kaj korupto. Poste, ili vendis ilin altpreze kaj profitis de tio je 290 000 juanoj.

En Pekino plej frue komenciĝis la denunclaboro de la okcidenta distrikto. Januare de 1988, la Popola Prokurorejo de la Okcidenta Distrikto funkciigis denunco-telefonon kaj la unua starigis rektan rilaton kun popolanoj.



En analizo de kazo

Su Deyong, vicestro de la prokurorejo respondecanta pri denunclaboro, diris, ke en 1988 ili traktis sume 457 kazojn, preskaŭ 3-oble pli multe ol en 1987, kiam ne estis disvolvita tiu laboro. Li daŭrigis: "Laŭ la realeco la denuncado respondas al la popola volo, sekve ĝin subtenas la popolo."

En la lasta jarfino ili fondis denunco-stacion kun 3 laborantoj. Nelonge post kiam tio estis publikigita en ĵurnalo, la stacio ricevis informon de 2 laborantoj de la Dua Konstrua Kompanio de la Okcidenta Distrikto. Ili denuncis la estron de la dua grupo sub la kompanio pri lia kontraŭleĝa ekonomia ago. Laborantoj de la stacio tuj komencis enketi pri la kazo kunlabore kun koncernaj personoj. Por serĉi atestantojn kaj atestojn ili laboris 4 sinsekvajn tagojn kaj fine havis klaran konon pri la afero. Por subskribi kontrakton pri konstruado, li kaj du personoj de iu altlernejo pri la konstruado komplote faris falsan adjudikon. samtempe kun tio, li donacis al ili kolorajn televidilojn, vidoregistrilojn, magnetofonojn k.a. kun totala valoro de pli ol 10 000 juanoj.

Mi informiĝis en la denunco-centro ankaŭ, ke la denunclaboro ne nur estas alte taksata de la urbanoj, sed ankaŭ subtenata de la kamparanoj. La lastan aŭguston la denunco-stacio de Huairou-(Hŭajĵoŭ)-gubernio, Pekino, fondiĝis kaj sammonate akceptis denuncon far kamparano de Xushui-(Ŝjuŝuj)-gubernio, Hebei-provinco. Li denuncis iun vicsekciestron de la Huairou-a Buroo de Grenoj pri lia malkaŝa postulo de korupto en la laboro. Se kamparanoj ne donis al li monon, do li ne aĉetis ilian grenon, eĉ bonkvalitan. Post la denunco la stacio akiris la atestojn post kelktaga enketado: Tiu denuncito ricevis sume pli ol 40 000 juanojn per korupto en mallonga tempo.

Guo Minzhong diris al mi, ke depost la komenciĝo de la denunclaboro iuj ekonomiaj krimoj estis ĝustatempe malkovritaj kaj la krimuloj punitaj, kaj krome, tiuj, kiuj faris kontraŭleĝajn agojn, vidis la forton de la popola denuncado kaj mem venis al la stacio por sin denunci. Nelonge post kiam la supre menciita vicsekciestro estis akuzita, lia kunlaboranto venis al la stacio, konfesis sian koruptiĝon kaj fordonis pli ol 1 000 juanojn ricevitajn per korupto. Guo diris, ke ĝis nun 15 krimuloj sin denuncis. ■

# Tetrinkejoj ŝatataj de Chengdu-aj loĝantoj

Teksto de **WEI LIAO**
Fotoj de **SI GONG** kaj **WEI LIAO**

LA urbo Chengdu estas bona loko por tiuj, kiuj ŝatas movoplenan kaj prosperan urbon kaj ankaŭ la idilian vivon de kamparo.

Fruprintempe de la kuranta jaro, kiam mi promenis en la Komercejo de Chengdu, pri kiu fieras la Chengdu-aj urbanoj, mi vidis, ke la brunaj montrofenestroj de ambaŭflankaj vendejoj spegulis diversajn klientojn. El unu vendejo de sonaj aparatoj elŝvebis patosa kantado kaj malaperis en la brua homfluo...

Elirinte el la Komercejo, mi estis altirata de konstruo simila al templo. Ĝin enirinte, mi trovis ene zigzagajn koridoron kaj vojetojn. Ĝi havas korton kun pavilono ĉe malgranda baseno. En la korto pompe floris magnolioj. Ĉe la koridoro staris tabloj por tetrinkado ĉirkaŭe kun faldeblaj seĝoj. Kelkaj maljunuloj sidis ĉe tabloj. Ili aŭ trinkis teon aŭ babilis senĝene. Iuj junaj paroj kolombumis, apogiĝante unu al alia. La kelneroj moviĝis inter la sidantaj tetrinkantoj. Ili levis sian kupran akvokruĉon, varmega bolinta akvo tuj verŝiĝis el la brila kruĉbuŝo ĝuste en la tebovlojn de gastoj. Tio estas Yuelai-tetrinkejo fama en Chengdu. Elirinte el la movoplena bazaro kaj vidinte la kvietan scenon, mi tuj eksentis plezuron.

La tetrinkejo konstruiĝis en 1905. Ĝi estas la plej granda en Chengdu kaj havas 800 sidlokojn. Ĝia direktoro diris al mi, ke ĉiutage lia tetrinkejo havas multajn klientojn. Matene ŝatas tetrinki tie

Senkovra tetrinkejo






La tetrinkejo Heming



Renkontiĝo de malnovaj amikoj



Ŝakludo

florílegaj kaj birdamaj maljunuloj. Post la naŭa antaŭtagmeze, multaj komercistoj venas tien por trakti negocon kaj interŝanĝi informojn. Kulturrondaj personoj ofte kolektiĝas tie kaj babilas senĝene pri pasintaĵoj aŭ aktualaĵoj. Tie troviĝas eĉ mezlernejanoj, ili ŝatas kvieton kaj tie sin ekzercas per lernitaj lecionoj.


En Chengdu ĉie estas tiaj tetrinkejoj kia Yuelai. Neniu scias precize ilian nombron. Kien ajn oni iras, oni ĉiam povas trovi kontentigan tetrinkejon. Paginte tridek aŭ kvardek fenojn (1 juano = 100 fenoj), oni povas tie ĝui en komforta seĝo bonodoran teon miksitan kun jasmenaj floroj.

Historia materialo diras, ke la tetrinkejoj kaj tetrinkado en Chengdu jam furoris mil jarojn. En la komenco de la kuranta jarcento en Chengdu jam troviĝis 400-500 tetrinkejoj.

La tetrinka moro formiĝis eble pro tio, ke en la historio la trafiko de tiu regiono estis maloportuna, militado estis malpli ofta ol en aliaj lokoj de Ĉinio. Kaj krome, la loko estis riĉa je produktaĵoj. Tial la loĝantoj en libera tempo kutimis trinki teon por sin distri. Ĝuste pro tio, tetrinkejoj aperis kaj longe prosperis.

La tetrinkejoj de Chengdu karakteriziĝas per malgrandaj kvadrataj lignaj tabloj, bambuaj seĝoj kaj bovloj kun kovrilo. Tetrinkado per bovlo kun kovrilo estas scienca. Se oni kovras la bovlon tuj post infuzado, la teo fariĝas pli forta. Kiam oni deprenas la kovrilon, ne plu fortiĝas la teo en la bovlo.

La akvoverŝado de tetrinkejoj en Chengdu jam fariĝis aparta arto. Wu Qingyun, maljuna majstro de la tetrinkejo de la Kultura Palaco, posedas du mirindajn teknikojn: Li portas ok seriojn da bovloj kun tefolio en la maldekstra mano kaj grandan kupran kruĉon en la alia mano. Je facila ĵetado de lia maldekstra mano, ok serioj da bovloj kun kovrilo dismetiĝas antaŭ la klientojn, samtempe kun tio li jam levas la kupran kruĉon per la dekstra mano kaj precize verŝas ĵus bolintan akvon en la bovlojn. Ankaŭ li povas porti dumane po unu


Tetrinkado en bambuaro

kupran kruĉon kaj samtempe verŝi bolintan akvon en bovlojn antaŭ klientoj. La akvonivelo en ĉiu bovlo estas iom pli alta ol la bovla rando, sed la akvo ne superfluas el la bovloj. Oni diris, ke en la urbo nur Wu Qingyun posedas tiun mirindan akvoverŝan teknikon. Du kultureblaj junuloj bedaŭrinde forlasis la profesion pro tio, ke ili malestimis la laboron de tetrinkeja kelnero.

La tetrinkejoj de Chengdu estas grava parto de la spirita vivo de multaj urbanoj. Ekz., ĉiun dimanĉan posttagmezon, la Asocio de Sichuan-operaj Amatoroj okazigas kantadon en Yuelai-tetrinkejo. Tiuj Sichuan-operaj amatoroj estas ankaŭ klientoj de la tetrinkejo. Ili plejparte neniam sursceniĝis kaj volas iom kanti la operon en la tetrinkejo por mildigi sian soifon pri la opero-prezentado. Oni diris, ke iu amatoro, al kiu oni ne permesis kanti tie pro lia tro malalta nivelo en kantado, volonte laboras kiel kelnero en la tetrinkejo dum la aktivado, kun peto ke oni lasu lin iom kanti. La asocio konsentis lian peton. De tiam ĉiufoje li kantis tie unu frazon, tio portis al li grandan ĝojon. Kiam oni hazarde forgesis inviti lin kanti, li okupiĝis ankaŭ pri la kelnera laboro, sed li iam forte movis seĝon, la granda bruo montris lian malkontenton.

La tetrinkejoj de Chengdu estas ankaŭ grava parto en la vivo de multaj maljunuloj. Iun tagmezon,



Alilandaj turistoj en tetrinkejo


en Heming-tetrinkejo en la Popola Parko, mi vidis 70-jaran maljunulon kun pipo en la buŝo. Li fumis kaj trinkis teon sola, malofte rigardis ĉirkaŭajn homojn kaj malproksimajn pejzaĝojn. En babilo kun la maljunulo mi informiĝis, ke jam de la aĝo de 20 jaroj li vizitas la tetrinkejon preskaŭ ĉiutage. Kun kresko de la aĝo, lia sidado en la tetrinkejo fariĝas ĉiam pli longa. Nun, ĉiutage li trinkas teon de mateno ĝis tagmezo. Li silente sidis tie kaj ne babilis kun aliaj. Li diris, ke ankaŭ tia sido estas interesa.

En la tetrinkejo de la Sporta Parko, mi hazarde vidis amason da maljunulinoj partoprenantaj kolektivan aktivadon. Ilia vivmaniero evidente estis pli aktiva ol tiu de la maljunulo en Heming-tetrinkejo. Starante cirkle, ili jen frapis la manojn, jen piedpremis la teron, kantante antikvan infankanton. Ili sin montris viglecplenaj. Poste iu maljunulino kantis sola "Sur Alta Leŭsa Deklivo", popularan en Ĉinio. Kvankam ŝia voĉo estis raŭka, tamen ŝia kantado estis iom gustohava. Post la kantado la maljunulino venis rekte al mi kaj timeme demandis: "Ĉu mi povos prezenti etan programeron por televido?" Mi estis konfuzita de ŝia subita demando, sed tuj komprenis, ke ŝi prenis mian fotilon kun teleobjektivo de 200-milimetra fokusdistanco por kamerao. Ŝi nomiĝas Hu Qinghua, 71-jara, kaj havas sep filojn kaj du filinojn, kiuj laboras en aliaj lokoj. Ŝi volis, ke ŝiaj gefiloj povu vidi ŝin en televidilo. Vidante ŝian seriozan mienon, mi ne volis rompi ŝian revon, sed neniel povis ŝin helpi.

En Chengdu estas multaj tetrinkejoj kun amuza aktivado. Ekz. la tetrinkejo de la Laborista Klubo de la Orienta Distrikto ĉiuvespere okazigas zimbalonan ludon. Zimbalona ludo estas tradicia tetrinkeja arto de kant-rakonta muzikilludo en Sichuan-provinco. Kiel grava konsistiga parto de tetrinkejoj de Chengdu zimbalon-luda trupo de la Orienta Distrikto partoprenis la Aŭtunan Artan Festivalon en Parizo. Krome, troviĝas ankaŭ tetrinkejoj por amatoroj de ĉina ŝako kaj vejĉio, Shengxi-tetrinkejo por birdobredaj amatoroj kaj eĉ tetrinkejoj por bilardaj amatoroj aŭ televidaj rigardantoj.

Iun vesperon mi iris en strateton. En ĝia profunda loko mi trovis malgrandan tetrinkejon kun 20-30 sidlokoj. Ĝi estis plena de klientoj. Ili kaj trinkis teon kaj rigardis legendan filmon elsendatan de la Sichuan-provinca Televida Stacio. La mastro de la tetrinkejo diris al mi, ke lia tetrinkejo estas strikte ligita kun la televidaj programeroj. Se la programeroj estas interesaj, lia komerco prosperas; se ili estas sengustaj, lia komerco do fariĝas malprospera.

Kiam mi eliris el la strateto, la strato antaŭ mi estis plene prilumata kaj movoplena. Mi pensis, ke por la tuttage okupiĝantaj urbanoj, tetrinkejoj sendube estas idealaj ripozejoj. ■






Geamantoj

Tetrinkado


En la tetrinkejo Yuelai



XU GUANGJI*:

# Novaj eltrovoj de ĉinaj arkeologoj

SUB la vasta tero de Ĉinio kuŝis abundaj fosilioj de homoj kaj objektoj el paleolitiko, kaj oni jam trovis ilin en pli ol 200 lokoj. La plej frue malkovritaj estis fosilioj de Pekin-homoj (antaŭ 460 000-230 000 jaroj), kaj post tio oni trovis sinsekve Lantian-homojn (antaŭ 750 000-1 000 000 jaroj) kaj Yuanmou-homojn (antaŭ 1 700 000 jaroj) pli fruajn ol Pekin-homoj. En la lastaj jaroj oni trovis



Fosilia kranio de pitekantropo en Hexian-gubernio

Ruino de granda domo en Dadiwan



en Hexian-gubernio de Anhui-provinco fosiliajn kraniojn kaj makzelojn de pitekantropo, kaj sur la monto Jinniu en Yingkou-gubernio de Liaoning-provinco kompare sendifektajn fosiliajn kraniojn kaj parton de skeleto de pitekantropo. Tio pruvis, ke pitekantropo vaste dislokiĝis en Ĉinio.

En Ĉinio troviĝas pli ol 7000 ruinoj de neolitiko kaj pli ol 400 el ili estis prifositaj. La riĉaj materialoj liveritaj de la prifosado donis pli kaj pli klarajn konturojn de la neolitikaj kulturoj en diversaj regionoj kaj pli kaj pli precizigis la kronologian tabelon de diversaj regionoj en neolitiko. En la lastaj jaroj la arkeologio pri neolitiko multe progresis en du flankoj: Unue, oni malkovris la kulturojn antaŭ kvin mil jaroj a.K., kio multe akcelos la esploradon pri la fonto de Yangshao-kulturo kaj pri la formiĝo de la agrikultura kulturo de Ĉinio. Due, la novaj trovoj pri la neolitika kulturo en la lasta periodo, t.e. en la 3000-2000-aj jaroj a.K. donis novajn atestojn por esplorado pri naskiĝo de la ĉina civilizacio.


De la dua duono de la sepdekaj jaroj oni difinis Cishan-, Peiligang- kaj Dadiwan-kulturojn en la baseno de la Flava Rivero inter la 6000-a kaj 5400-a jaro a.K.. Ili estis la plej fruaj agrikulturaj kulturoj de fiksaj loĝantoj. La ĉefa kulturaĵo estis milio, la agrikulturiloj estis ŝtonaj ŝoveliloj, tranĉiloj kaj falĉiloj, la dombestoj estis porko, hundo kaj koko. La loĝejo estis duonkavo. Tiam oni havis komunan tombejon kaj uzis fajencajn tripiedajn ujojn kaj pelvojn kun rondaj bazoj. Ili estis mil jarojn pli fruaj ol Yangshao-kulturo malkovrita en la dudekaj jaroj kaj havis saman fonton kun Yangshao-kulturo. Tio pruvis, ke Yangshao-kulturo genezis indiĝene. La daŭra esplorado eble solvos la demandon pri la genezo de la agrikultura kulturo de Ĉinio.

En la lastaj jaroj multe sukcesis la esplorado pri la posta periodo de la neolitika kulturo en 3000-2000 jaroj a.K. Ekzemple en Dadiwan de Gansu-provinco oni trovis ruinon de granda domo kun areo de pli ol 300 kvadrataj metroj. La domo konsistis el antaŭa, posta, orienta kaj okcidenta ĉambroj. En Dongshanzui kaj Niuheliang de Liaoning-provinco oni trovis ruinojn de kulta altaro, templo kaj tombo. En la ruinoj de altaro kaj templo oni trovis argilajn diojn kaj en la ŝtonaj tomboj delikatajn jadaĵojn. En la tombejo de Taosi de Shanxi-provinco oni prifosis pli ol 1000 tombojn. En 9 grandaj tomboj oni trovis centojn da fajencaj pletoj kun koloraj drakoj, tamburojn el aligatora ledo, gaman sonorilaron kaj aliajn ritilojn, kiuj montris la altan rangon de la entombigitoj. Sed en plejmultaj tomboj oni trovis preskaŭ nenion. En Zhejiang-provinco oni trovis 22 tombojn kadre de Liangzhu-kulturo. En la tomboj konserviĝis pli ol 4000 jadaĵoj en diversaj formoj kaj jadaj birdoj, fiŝoj kaj testudoj. Inter la desegnaĵoj sur la jadaĵoj estas pluraj bildoj de dio kun besta kapo, kiujn oni prenis kiel "dian emblemon". La valoraj jadaĵoj markis potencon kaj rangon de la entombigitoj. En tiu periodo aperis bronzaj tranĉiletoj kaj pikiloj. Sur fajencaĵoj vidiĝas diversaj signoj por noto. En la provincoj Henan kaj Shandong oni trovis kastelon el ramita tero. Laŭ la supre diritaj malkovroj oni povas aserti, ke la ĉina civilizacio evoluis ĝuste sur tiu tero kaj havas karakterizan formon en sia evoluado.

En la periodo de Erlitou-kulturo (20-16-a jc. a.K.) Ĉinio eniris en civilizacian socion. Ĉe la ruino en Erlitou-kulturo en Yanshi-gubernio Henan-provinco, oni trovis ruinon de palaco kaj metiejoj de bronzaĵoj kaj fajencaĵoj. Inter la bronzaĵoj estas ne nur instrumentoj kaj armiloj, sed ankaŭ malgrandaj ujoj. Oni trovis ankaŭ signojn analogajn al skribaĵoj, kaj parto el ili similis al surostaj skribaĵoj. Ĉu Erlitou-kulturo estas la kulturo de Xia-dinastio (21-16-a jc. a. K.)? Tio estas ŝatata temo de ĉinaj arkeologoj kaj historiistoj.

Unu el la gravaj trovaĵoj de arkeologoj pri la antaŭa periodo de Shang-dinastio (16-14-a jc. a.K.) estas ruino de la ĉefurbo por la antaŭa periodo de Shang-dinastio en Yanshi-gubernio de Henan-provinco. La urbo longis 1700 metrojn kaj larĝis 1200 metrojn. Sude de la urbocentro estas ruino de pa-

Ingoj kun cervomanĝanta tigro kiel la bazo



laca urbo kun ruino de palacaj konstruaĵoj. La strukturo de "urbo en urbo" fariĝis modelo imitata de la postaj dinastioj en la urbokonstruado. En la urbo Anyang de Henan-provinco estas urino de la ĉefurbo de Shang-dinastio en ĝia posta periodo (13-11-a jc. a.K.). De 1928, oni trovis tie ruinon de palaco kaj reĝaj tomboj, kavon de viktimoj entombigitaj kune kun altrangaj mortintoj, grandan kvanton da ostoj kun skribaĵoj, kaj ruinojn de metiejoj de bronzaĵoj, jadaĵoj kaj ostaĵoj. La tombo de Fuhao prifosita en la lastaj jaroj estis la unua plej bone konservita tombo de membro de la reĝa familio de Shang-dinastio. En la tombo estis pli ol 200 bronzaj liturgiaj necesaĵoj kaj pli ol 600 jadaĵoj, majstraĵoj de la posta periodo de Shang-dinastio. Tian tombon oni trovis unuafoje en la lastaj 60 jaroj. Antaŭ nelonge oni trovis en la ruino Sanxingdui en Guanghan-gubernio, Sichuan-provinco, kavon de viktimoj de bronzaj homoj kaj homkapoj, liturgiaj necesaĵoj kaj jadaĵoj. La bronzaj homoj en karakteriza plastiko portas fortan lokan stilon.

Zhou-dinastio dividiĝis en du partojn: La Okcidenta Zhou (11-a jc. — 771 a.K.) kaj la Orienta Zhou (770-256 a.K.). Antaŭ kelke da jaroj arkeologoj multe sukcesis en prifosado de la ruinoj de la ĉefurboj Feng kaj Hao de la Okcidenta Zhou-dinastio, kiuj situis proksime al la nuna urbo Xi'an. Oni opiniis, ke la prifositaj grandaj konstruaĵoj ĉe la ruino Zhouyuan de la ĉefurbo de Zhou-dinastio en la unua periodo estis temploj, palacoj aŭ domoj de aristokratoj. Tie oni trovis ankaŭ grandan kvanton da rompitaj testudaj ŝeloj por aŭguro, 200 el ili surhavas skribaĵojn. Tie oni trovis plurajn kelojn kun granda kvanto da bronzaĵoj kune entombigitaj. Ĝenerale la bronzaĵoj surhavas intajlajn skribaĵojn tre valorajn kaj fidindajn por esplorado pri la tiama socio. En la Orienta Zhou-dinastio rimarkinde progresis fera fandado kaj oni trovis plurfoje feraĵojn faritajn en tiu periodo. Arkeologoj prospektoradis kaj prifosis en malsama skalo la ruinojn de la ĉefurboj de la regnoj de la Orienta Zhou-dinastio. Ĉ. 8000 tomboj de tiu periodo estis prifositaj, kaj multaj el ili estis tomboj de aristokratoj. El la prifositaj tomboj estis la tombo de markizo Yi de Zeng-regno en la nuna Suixian-gubernio de Hubei-provinco kaj la tombo de la reĝo de Zhongshan-regno en la nuna Pingshan-gubernio de Hebei-provinco. En la tombo de Yi estis multe da delikataj objektoj kaj la plej valora estas gamosonorilaro, kiu estas ankoraŭ taŭga por ludi muzikon. En la tombo de la reĝo de Zhongshan-regno estis E-forma bronzaĵo, simbolo de la reĝpotenco, kvadrata tablo damaskenita per ora kaj arĝenta drako kaj fenikso. La longa intajla teksto sur la bronzaĵo estas tre utila por esplorado pri la historio de Zhongshan-regno.




Vazo kun pinta bazo farita antaŭ 5000 jaroj

Ying Zheng unuigis Ĉinion en la 221-a a.K. kaj starigis centralizisman Qin-dinastion. Lia maŭzoleo situas en Lintong-gubernio proksime al Xi'an. Oriente de la maŭzoleo oni trovis kvar kavegojn kun 7000 terakotaj soldatoj kaj ĉevaloj en la grandeco de la veraj. Tie estas ankaŭ militĉaro. Antaŭ kelke da jaroj oni elfosis okcidente de la maŭzoleo du bronzajn ĉarojn tiratajn de bronzaj ĉevaloj. Chang'an kaj Luoyang, la ĉefurboj de Han- kaj Tang-dinastioj, estas tre gravaj ruinoj longe prospektorataj kaj prifosataj. En la lastaj jaroj ĉinaj arkeologoj prifosis la ruinojn de la ĉefurboj de Wei-regno (220-265) kaj la Norda Qi-regno (550-577), kiuj havis gravan signifon en la evoluo de la urboj de Ĉinio. Dekmiloj da tomboj de la dinastioj Han kaj Tang estis prifositaj. Krom la du famaj tomboj de Han-dinastio respektive en Mancheng-gubernio kaj en Mawangdui de Changsha, oni prifosis en la lastaj jaroj proksime de Kantono la tombon de la reĝo de la regno Nayue koincida al Han-dinastio. En la tombo ili trovis veston el jadaj pecoj kunligitaj per silkaj fadenoj, oran sigelilon, kornoforman jadan pokalon kaj jadan zonon kun oraj agrafoj. En 1987 oni trovis hipogeon sub la budha pagodo en la templo Famen de Tang-dinastio en la gubernio Fufeng de Shaanxi-



Vinujo elterigita en la tombo de Fuhao




Jada drako farita en la 13-a jc. a.K.



provinco. En la hipogeo estis granda kvanto da oraj kaj arĝentaj ujoj, vitraĵoj, testilaĵoj kaj porcelanaĵoj. Ĉiuj tiuj objektoj estis enterigitaj en 874 p.K. La oraj arĝentaj ujoj montras majstrecon kaj inter la vitraĵoj troviĝas tiuj el Orienta Romanio kaj Okcidenta Azio. La trovo de tiuj vitraĵoj havas gravan signifon en esplorado pri la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj la Okcidento. ■

* La aŭtoro estas vicestro kaj vicesploristo de la Arkeologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj.

Kolora fajenca pelvo farita antaŭ 3 000 jaroj




Tablo dekoraciita per drakoj kaj feniksoj

# Esperanto kaj mia lernado de fremdaj lingvoj

de ZHANG QICHENG*

ANTAŬ ol mi eklernis Esperanton, mi jam lernis la anglan lingvon por kelkaj jaroj, sed tamen ankoraŭ restis kiel komencanto. Sed poste, mia lernado de tiu lingvo multe progresis. Tio ja ŝajnas al mi mirindaĵo kaj nur post longa tempo mi trovis, ke tio estis neniel mirinda sed tute natura, ĉar mi lernis Esperanton kaj ĝi rolis kiel helpilo en mia anglalingva lernado.



La aŭtoro

En la angla lingvo troviĝas multnombraj afiksoj. Estas prefiksoj **dis**, **un**, **mis**, **non**, kaj sufiksoj **ful**, **ish**, **ment**, **tion**, ktp. Sed tiuj afiksoj ne estas uzataj laŭregule kaj vortoj kun afiksoj estas rigardataj kiel memstaraj kaj aparte traktataj en vortaroj. Tio certe malfaciligas la lernadon. Do, kiam mi kiel esperantisto trovis, ke tiaj vortoj kiel **unfair**, **discover**, **judgement**, **distortion** k.c. fakte ne estas memstaraj vortoj sed vortoj faritaj el radikoj kun prefiksoj aŭ sufiksoj, mi povis facile kompreni iliajn signifojn kaj parkerigi ilin sen ia penado, dume neesperantistaj lernantoj devas multe klopodi por tion fari. Estas notinde, ke en la angla lingvo ankaŭ troviĝas kelkaj "mal"-vortoj, ekz., **malnutrition**, **malcontent**, **maltreat**, k.c. Tiuj vortoj sendube ne estas fremdaj por mi.

En la angla lingvo, oni havas la vortojn **tooth** por dento kaj **eye** por okulo, sed por dentisto kaj okulisto, oni ne havas "**toothist**" kaj "**eyeist**" sed anstataŭe **dentist** kaj **oculist**. Kvankam neesperantistaj lernantoj konfuziĝas pri tiuj vortoj, mi tamen facile ilin kaptas. En tiu lingvo ne estas vortoj "maro " kaj "skribi", sed estas vortoj **marine** (mara), **mariner** (maristo), **maritime** (mara aŭ marborda) kaj **describe** (priskribi) kaj **description** (priskribo). Por mi, ili estas evidente vortoj devenaj el radikoj "mar" kaj "scrib", do, facile kompreneblaj. Angle, P.S. estas mallongigo de **postscript**, kiu analogas al la Esperanta vorto "Postskribo" kaj mi tuj ĝin komprenis.

Estas ege interese, ke la angla vorto por skolopendro estas **centipede**, kiun mi tuj komprenis unuavide, ĉar ĝi aspektas multe kiel Esperanta vorto. Krome, en mia hejmurbo, oni nomas skolopendron "centpiedulo", mi do trovis ĝian ekvivalenton en tiu angla sed fakte Esperanta vorto **centipede.**

Mi devas konfesi, ke en mia lernado de la angla lingvo, Esperanto iukaze donis al mi malan helpon, ekz., ĝi kaŭzis, ke mi misprononcis la anglan vorton **restaurant**, mi iam prononcis ĝin "restorant" anstataŭ "restront". Sed ŝajnas al mi, ke pri tio ne kulpas Esperanto sed la angla lingvo mem pro sia neregula prononcado.

Pri la temo kiel Esperanto helpis min en mia lernado de la indonezia lingvo, mi havas multon por rakonti.

Mi sciis nenion pri tiu lingvo antaŭ ol mi elmigris el Ĉinio al Singapuro en la jaro 1941. Kiam la japanaj militaristoj invadis Singapuron je la 8-a de decembro tiujare, mi estis ĵurnalisto de iu ĉinlingva ĵurnalo eldonita en tiu havenurbo. Post nelonge, Singapuro falis sub japanan okupadon kaj mi estis devigita fuĝi al la najbara indonezia insulo Sumatro kune kun

aliaj patriotaj intelektuloj. En Sumatro, plejparto de la loĝantaro, eĉ inkluzive ĉinojn, parolas indonezie. Sekve, por la neceso de ĉiutaga vivo kaj ankaŭ por informiĝi de la indonezialingva ĵurnalo, mi eklernis la lingvon. Malgraŭ tio, ke mia lernado estas iom hazarda, mi multe interesiĝis pri la lingvo kiam mi ĝin ektuŝis. La ĉefa kaŭzo estas, ke indonezia lingvo multe similas al nia kara lingvo Esperanto.

Same kiel Esperanto, la indonezia lingvo havas kvin monoftongajn vokalojn **a**, **e**, **i**, **o**, **u**, kaj la prononcado de la vokaloj en ambaŭ lingvoj estas tute sama. Ĝuste kiel en Esperanto, en indonezia lingvo, ankaŭ ĉiu vorto estas legata kiel ĝi estas skribita. Do, la lingvo estas fonetika, belsona kaj por mi, familiara. La simileco inter la du lingvoj ankaŭ kuŝas en tio, ke ili ambaŭ havas multajn afiksojn. Kelkaj prefiksoj kaj sufiksoj de la indonezia lingvo eĉ analogas al tiuj de Esperanto. Jen estas tre interesaj ekzemploj: la indonezia prefikso **pe** similas al la Esperanta **ist**, **ul**, aŭ **ant**, ekz., la indonezia vorto **laut** signifas maro, do **pelaut** signifas maristo, **muda** signifas **juna**, do **pemuda** signifas junulo, **baca** signifas legi, do, **pembaca** (laŭ indonezia gramatiko, antaŭ la litero **b**, la prefikso **pe** devas fariĝi **pem**) signifas leganto; la indonezia sufikso **an** similas al la Esperanta **aĵo**, ekz., la signifo de la indonezia vorto **makan** estas manĝi, do **makan** + **an** = manĝaĵo, la vorto **tulis** (skribi) plus **an** fariĝas **tulisan** kaj ĝi signifas skribaĵo aŭ verkaĵo.

Krome, ambaŭ lingvoj enkondukis grandnombrajn vortojn el la eŭropaj lingvoj, el tio rezultis, ke multaj vortoj el la du lingvoj estas preskaŭ samaj aŭ eĉ tute samaj, ekz., **pantalon** (pantalono), **erloji** (horloĝo), **oto** (aŭto), **format** (formato), **fabrik** (fabriko), **tempo** (tempo), ktp.

Memkompreneble, tia lingvo kia indonezia estas alloga kaj facile posedebla por tiu, kiu scipovas la Internacian Lingvon.



La aŭtoro (la dua de maldekstre en la malantaŭa vico) kaj liaj amikoj en Hongkong en 1949

Mi nur iomete lernis la rusan lingvon, tamen, jam antaŭ tio, mi konis la cirilan alfabeton kaj danke al Esperanto, mi povis kompreni sufiĉe multajn rusajn vortojn, ekz., **РЕСТОРАН** (restoracio), **ТЕАТР** (teatro), **КИОСК** (kiosko) ktp. Esperanto ankaŭ helpas min kompreni la germanajn vortojn **wagen** (vagono), **flughafen** (flughaveno) k.a., por ne paroli pri vortoj el la lingvoj hispana kaj itala, la parencaj lingvoj de Esperanto.

Estas domaĝe, ke mi ne plene utiligis la helpemon de Esperanto por lerni plurajn fremdajn lingvojn, alie, mi verŝajne fariĝus poligloto en la vera senco de tiu vorto. ■

---

* La aŭtoro estas ĝenerala sekretario de ĈEL kaj honora membro de UEA.

## Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

| UTC | Al Regionoj | Ondoj (m) | kHz |
|---|---|---|---|
| 20:00-20:30 | Eŭropo | 40.1 | 7470 |
| | | 31.5 | 9500 |
| | | 30.1 | 9965 |
| 22:30-23:00 | Latin-Ameriko | 30.4 | 9860 |
| | | 26 | 11515 |
| 11:00-11:30 | Japanio, Koreio | 31.6 | 9480 |
| | | 43.1 | 6955 |
| 13:00-13:30 | Sudorienta Azio | 25.7 | 11650 |
| | | 19.7 | 15165 |

• Post prospektorado ĉinaj geologoj konstatis, ke profunde sub la olekampo de Daqing (Daĉing) de Ĉinio estas cent miliardoj da kubmetroj da natura gaso. En la maro ĉe Yinggehai de Hainan-provinco, kune prospektorata de Ĉinio kaj Usono, oni trovis lastatempe ankaŭ grandegan gaskampon kun rezervokvanto de ĉ. cent miliardoj da kubmetroj.

• Kompleto da ŝtaligaj ekipaĵoj kun totala pezo de pli ol mil tunoj, eksportita unuafoje de Ĉinio, jam atingis Indonezion lastatempe.

• Ĝis marto de la kuranta jaro la ĉina banko reprenis 873 milionojn da juanoj, je 765 milionoj pli multe ol en la sama periodo de la pasinta jaro.

• En 1988 la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo de la specialaj ekonomiaj distriktoj Shenzhen (Ŝenĝen), Zhuhai (Ĝuhaj), Shantou (Ŝantoŭ) kaj Xiamen (Ŝjamen), starigitaj de Ĉinio en 1980, atingis 15.7 miliardojn da juanoj, 12-oble pli multe ol en 1980.

• Ekfunkciis en Nankino avangarda movebla telefonio, kies sistemo povas konektiĝi kun enurba, enlanda longdistanca kaj internacia telefonioj. Oni povas telefoni eĉ en aŭto.

• La Ĉina Nacidefenda Scienc-teknika Universitato lastatempe elfaris saĝan ĉareton ekipitan per unu kamerao kaj ses mikrotraktiloj, kiu povas mem stiri kaj fari ĉirkaŭiron, kiam ĝi renkontas obstaklon survoje.

• La unua granda multuza helikoptero projektita kaj farita de Ĉinio lastatempe sukcese trapasis ekspertizon, kaj tiaj helikopteroj estos produktataj.

• La Ŝtata Statistika Buroo taksis, ke ĉi-jare la areo de la kampoj de ole-plantoj kreskis je 270 000 hektaroj kompare kun tiu en la pasinta jaro. Tio estas la unua releviĝo post redukto en tri sinsekvaj jaroj.

• La Ŝtata Sistem-reforma Komisiono informis, ke Ĉinio plene efektivigos variĝon de la loĝdomoj tra la lando en la venontaj 15 jaroj. La principo estos ne plimultigi la elspezon de la ŝtato nek pezigi la ŝarĝon de la salajruloj.


• En la pasinta jaro Ĉinio produktis 7.39 milionojn da fridujoj kaj tiel fariĝis la unua granda fridujo-produkta lando.

• De 1952 ĝis nun la ĉina registaro donis al la Tibeta Aŭtonoma Regiono 12 miliardojn da juanoj kiel financan subvencion kaj monsumon por investo. La regiono funkciigis per la mono aron da malsanulejoj kaj lernejoj, kiuj faras senpagan kurac-servon al la urbaj loĝantoj kaj paŝtistoj kaj senpagan klerigon al la element- kaj mezlernejanoj.

• En Ĉinio la demokratiaj partioj havas 291 000 membrojn, kies duono estis nove partianiĝinta en la lastaj kvin jaroj.


• La unua arte fekundigita blanka simio en la mondo naskiĝis en la Zoologia Instituto de Kunming, Yunnan-provinco. Tio havas gravan signifon por esplori kaj kuraci albinismon.

• La kolizio inter la hinda plato kaj Eŭrazio levas la Qinghai-(Ĉinghaj)-Tibetan Altebenaĵon de Ĉinio je 5-10 mm. ĉiujare. Ĉinaj specialistoj mezuris la dikecon de la terkrusto en la regiono de Qomolangma (Everesto) kaj aliaj regionoj de Tibeto kaj konkludis, ke la terkrusto de la regiono de Qomolangma ankoraŭ ne atingis ekvilibron.



Ekfunkcias en Pekino serĉatoro de internaciaj donitaĵoj.

Fabrikado de fridujoj en la Elektr-aparata Kompanio Wanbao en Guangdong-provinco



● La Unua Internacia Ĉin-medicina Simpozio pri Renaj Malsanoj okazos en Tianjin (Tjanĝin), oktobre de la kuranta jaro. Ĝiaj ĉefaj temoj estos ĉin-medicina farmakologio, akupunkturo, *ĉigong*-terapio por renaj malsanoj, afrodizia perturbo kaj urinologiaj malsanoj. La organizanto bonvenigas ĉiulandajn kolegojn. Koncerne la detalojn oni povas kontaktiĝi kun s-ro Zhang Daning (Ĝang Daning) de la prepara komisiono por la Internacia Ĉin-medicina Simpozio pri Renaj Malsanoj en la Tianjin-a Ĉin-medicina Hospitalo.

● Statistiko montras, ke la ĉina loĝantaro (ekskluzive de tiu en Hongkongo, Aŭmen kaj Taiwan) nombras 1.1 miliardojn. En 1949 Ĉinio havis 540 milionojn da loĝantoj kaj post 40 jaroj la nombro duobliĝis.

● Ĉinio kaj Sovetunio nun venis en akordon pri la plejparto de la orienta 3 000-kilometra landlimo. Interalie, Zhenbao(Ĝenbaŭ)-insulo, pro kies aparteno okazis granda milita konflikto antaŭ 20 jaroj, estas konfirmita de ambaŭ landoj kiel ĉina teritorio.

● "Ĉinio volas disvolvi novan rilaton kun Albanio," diris ĉina vicministro de eksteraj aferoj Tian Zengpei dum la intervidiĝo kun la albana delegacio la 29-an de marto.

● La rakonta filmo "Homoj, Fantomoj kaj Amo" reĝisorita de s-ino Huang Shuqin (Hŭang Ŝuĉin) de la Ŝanhaja Filmo-studio gajnis la Publikan Premion en la 11-a Internacia Virina Filmfestivalo.

● Aprile en la Muzeo de la Ĉina Popola Revolucia Milito en Pekino eksponiĝis ĉin-stila pentraĵo "Granda Muro", 620 m. longa kaj 2.87 m. larĝa, kiu konsistas el 650 pecoj.

● "Fluganta Velo", ligna ŝipo farita en stilo de Qing (Ĉing)-dinastio (1644-1911), lastatempe estis lanĉita en Fuzhou (Fuĝoŭ), urbo de orienta Ĉinio. Ĝi, 31 m.longa kaj 8 m. larĝa, revidigis imponan aspekton de ĉina antikva ŝipo.

● En la gubernio Changle (Ĉangle) de la duoninsulo Shandong (Ŝandong) oni trovis malofte videblan en Ĉinio antikvan krateron. La kratero havas pli ol 60 m. en la diametro kaj pli ol 20 m. en la profundo. Dank' al ĝia foj-refoja erupciado en la antikveco la gubernio abundas je ercoj, kiaj safiro kaj oro.

● La plej granda jaspa skulptaĵo "Avalokitesvaro" estas elfarita de la Pekina Eburskulptejo. La skulptaĵo malhelverda, kun alto de 2.24 m. kaj pezo de 3 tunoj, estas farita speciale por la Internacia Budhisma Asocio.

---

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

* Laima Meiĵiene, 37-j., dez. kor. pri diversaj temoj: kulturaj objektoj, kantoj kun notoj, vojaĝoj, libroj, popolaj kutimoj, esperantaĵoj kaj materialoj pri E-movado. Adr.: 233031, Kaunas-31, V. Vitkausko 28-37, Litova SSR Sovetunio.

* Ĝis 07-31 tuj sendu BKn pri Jaĥto-haveno kaj Jaĥto (inkl. boato, barko, velboato, velŝipo kaj ŝipo). Dankesprime ni certe sendos belan BKn pri jaĥto. Adr.: 34-kai Sekai Jotto Taikai (La 34a Monda Jaĥto-Konkurso); 847 Saga-ken Karacu-ŝi, Karacu-Ŝijakuŝo, Japanio

* Membroj (11-18j.) de E-klubo dez. amikiĝi kun apartaj junaj geesp-istoj kaj E-grupoj en diversaj landoj de la mondo. Adr.: Esperanto-Klubo "Stela papageto", Pionirpalaco, str. Paleckio-43, 232600 Vilnius, Litovio, USSR.

* Anoj de la urba klubo volas kor. kun ĉinoj pri la ĉinaj poezio, muziko, vejĉio, uŝuo. P. O. Box 4220, SU-614000, Permo, Sovetunio.

* Sovetia Kolektivo Esperantista Komunista serĉas kontakton kun komunistoj de la mondo. Skribu kaj ĉiu ricevos respondon. Adr.: Poŝtkesto 913, SU-354000, Soĉi, Sovetunio.

* Kenata Swigonska, 18-j., dez. kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri literaturo, lingvoj, teatro, vojaĝo, bildkartoj kaj poŝtmarkoj. Skribu al: ul. Krasinskiego 45/17, 41-300 Dabrowa Gornicza, Pollando.

* Kiu interesiĝas pri la unika popola iniciativo "Svisio sen armeo" ricevos senpagan informon. Adr.: S-ro Rooke Roter Ziegel, CH 4702 Oensingen, Svislando.

* Miroslav Smiŝek, 26-j., dez. kor. tm. pri vojaĝo, literaturo, bildkartoj. Adr.: Engelsova 1534, 356 05 Sokolov, Ĉeĥoslovakio.

* Varszegi Eva, 17-j., dez. kor. tm. Adr.: 5310 Kisujszallas, Felkabaomeas ut 63/a, Sedad Meome, Hungario.

* 40-j. mag-ino de kulturpedagogio dez. kor. tm. pri psikoterapio, amo kaj viv-filozofio. Inka Weksler, pk 102, PL 58-400 Kamienna Gora, Pollando.

* Hasan, Gonĉe-Argavan, 20-j., dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Iran-Tehran, Narmak-Khavar Ave-Opposite the university "Elm va sanat"-Mehran Lane pl. 21, code post 16838.

MIHAI EMINESCU (Rumanio):

# DU POEMOJ

Okaze de la centjariĝo de la forpaso de Mihai Eminescu, la plej elstara rumana poeto, rekomendita de Unesko kiel grava kultura evento en la jaro 1989, ni aperigas liajn 2 poemojn en Esperanta traduko memore al tiu granda eminentulo.

**La Red.**



La aŭtoro

## Ĝis la stelo

*Ĝis la ekaperinta stel'*
*Estas vojego tia,*
*Ke bezonegis ĝia hel'*
*Jarmilon ĝis ter' nia.*

*Eble delonge tiu sun'*
*Jam estingiĝis ie,*
*Sed ĝia lum' apenaŭ nun*
*Atingis nin ĉi tie.*

*La bild' de l' stel' ŝovanta sin*
*Sur la ĉiel' majestas.*
*Ĝi estis, ni ne vidis ĝin;*
*Vidata, ĝi malestas.*

*Samtiel, kiam nia flam'*
*En nokt' profunda mutas,*
*La lum' de l' estingita am'*
*Nin tamen persekutas.*

Elrumanigita de **P. FIRU**

## Da centopaj ŝipaj mastoj

*Da centopaj ŝipaj mastoj*
*Forlasintaj bordsignalojn,*
*Kiom rompos sur la vastoj*
*La marventoj, la ondfaloj?*

*Da birdetoj elflugontaj*
*Are, sub ĉieltegmentoj,*
*Kiom mortos endronontaj*
*Pro l' ondfaloj, pro l' marventoj?*

*Ĉu postkure al bonŝanco,*
*Ĉu al altaj idealoj,*
*Ĉien sekvos vin la danco*
*De l' marventoj, de l' ondfaloj.*

*Senkomprenaj restas penso*
*Poemita, viaj sentoj.*
*Ĉiam bruas ilin denso*
*De ondfaloj, de marventoj.*

Elrumanigita de **C.D.**

---

MARIAN ZDANKOWSKI (Pollando):

## Mazdaĵetoj

### LA TABUOJ

*La tabuoj estas*
*pli fortaj ol ni...*
*kaj kontraŭstariĝi*
*povas nur geni'...*

### KIEL KUTIME

*sub la suno:*
*al kuraĝuloj*
*ridas fortuno.*

### VER-AMANTO

*Mi kontentiĝas*
*per io ajn,*
*sed nur per vero.*
*ne per la ŝajn .*

DA WEI:

# Resaniga medicino leviĝas en Ĉinio

RESANIGA medicino aperis en la mondo post la Dua Mondmilito. Ĝi enkondukiĝis en Ĉinion en la 80-aj jaroj. En la lastaj jaroj ĝi disvolviĝis subtenate de la ĉina registaro, diversaj rondoj de la socio kaj amikaj landoj. Mi informiĝis de koncerna departemento: Ĉinio disvolvas la resanigan aferon ĉefe per du kanaloj. Unu el ili estas la sociala bonstatiga departemento de registaro, kiu vivtenas kaj resanigas homojn, kiuj ne havas familion, nek infanon nek enspezon, kaj la alia estas resaniga institucio funkciigata de la Ĉina Handikapula Federacio kaj aliaj popolaj organizoj. Ĝi respondecas pri la resaniga laboro por granda nombro da handikapuloj. Kompreneble, la institucion subtenas la higiena kaj civila departementoj de la registaro.

## ĜOJIGA INFORMO POR HANDIKAPULOJ

En 1987 Ĉinio faris specimenan enketon pri handikapuloj laŭ la kvin normoj de handikapo. La rezulto de la enketo montras, ke en Ĉinio estas ĉ. 51.64 milionoj da handikapuloj, inkluzive de tiuj, kiuj havas perturbon en la kapablo de vido, parolo kaj aŭdo, intelekto, membroj kaj menso.

La plejparto de la ĉinaj handikapuloj ne ĝuas necesan resanigan kuracadon pro historiaj kaŭzoj kaj limigo de produktaj fortoj. La granda tertremo de Tangshan en 1976 mortigis 240 mil homojn, grave vundis 160 mil homojn kaj paraplegiis 3 817 homojn. Nun pli ol mil paraplegiitoj jam mortis. La handikapuloj soifas resaniĝon de sia korpo kaj menso, partoprenon en sociala aktivado, ricevon de laboro kaj akiron de enspezo por esti memstaraj homoj en la vivo.

"Kiel handikapulo, mi jam pasigis 20 jarojn. La praktiko en la vivo komprenigis al mi, kio estas resanigo," diris s-ro Deng Pufang, unu el la fondintoj de la Ĉina Handikapula Fonduso, en oktobro 1988, okaze de la inaŭguro de la Ĉina Resaniga Centro. La centro estas la unua sinteza institucio de Ĉinio por plene resanigi handikapulojn kaj trejni rilatajn fakulojn. Post du monatoj mi venis al la domego de la centro kun areo de 100 000 kvadrataj metroj kaj trovis, ke preskaŭ ĉiuj ĝiaj instalaĵoj estas pretigitaj.

La centro konsistas el unu dependa hospitalo kaj du institutoj. La hospitalo servas rekte al handikapuloj. Ĝi faros ĉiuflankan resanigan kuracadon al ili per moderna resaniga tekniko kaj ĉina tradicia medicino. La institutoj faros klinikan kaj teorian esploron pri tipaj kaj komplikaj problemoj renkontitaj en resanigado de handikapuloj, por serĉi novajn teknikojn de la resaniga kuracado.

En la Baza Instituto de la Resaniga Medicino, ĝia vicestro Yin Wenkao (Jin Ŭenkaŭ) konigis al mi, ke la suferantoj de nervovundiĝo okupas rimarkinde grandan parton de la handikapuloj, tial ĝi prenas kiel sian ĉefan esplortemon la nervo-regeneron kaj funkciorevivigon post nervovundiĝo, precipe post mjelovundiĝo.

Paraplegio, hemiplegio, cerba paralizo, sekvaĵo de infana paralizo k.a. serioze minacas la homojn. Pro tio, la centro kuracos ĉefe tiajn pacientojn kaj kreos por ili bonan resanigan medion per kuracaj, psikologiaj, socialaj kaj aliaj rimedoj.

En la lastaj jaroj la Ministerio de Publika Sano kaj diversaj handikapulaj organizoj faris multe da preparoj kaj trejnaj laboroj. Nun ĉ. 150 hospitaloj servas per operacio de sekvaĵo de infana paralizo kaj ili jam faris operacion al 88 000 tiaj pacientoj. En 1988 la ĉina registaro okazigis la Tutlandan Handikapul-resanigan Laborkunvenon kaj ellaboris la planon, ke en kvin jaroj 500 000 katarakttuloj reakiros vidkapablon, 300 000 suferantoj de la sekvaĵo de infana paralizo ricevos kuracadon kaj 30 000 surdaj kaj mutaj infanoj ekzerciĝos en aŭdokapablo.

## DIREKTO DE LA ĈINA RESANIGA AFERO

En la norda parto de Pekino troviĝas la Unua Sociala Bonstatiga

Servo de Pekino, kiu estas funkciigata de la magistrato por maljunuloj.

Ekde 1987, la maljunuloj vivantaj en tiu kvieta kaj eleganta konstruaĵo ricevas ankaŭ serion da resaniga kuracado, krom bona zorgado en la vivo. La vivtenado kaj resanigado plifortigis la korpon kaj animon de la maljunuloj en malsama grado.

Mi informiĝis de iu oficisto de la Pekina Civila Buroo, ke en Pekino troviĝas 4-5 tiaj servoj. Ili akceptis proks. mil vidvojn, orfojn, handikapajn infanojn, idiotojn kaj psikopatojn.

La Unua Sociala Bonstatiga Servo akceptas ĉefe maljunajn vidvojn, el kiuj la plejaĝa estas 105-jara. Ĝi konsistas el partoj porkuraca kaj porripoza. Laŭ la psikaj kaj fizikaj trajtoj de maljunuloj, medicinistoj unue alprenas diversajn rimedojn forigi ilian pesimisman animstaton kaj solecon, kaj due racie donas al ili sportan kaj fizikan kuracadon kaj organizas ilin en ekskurso, lernado de danco, amuzado kaj manlaboro. Ili ankaŭ donas al la maljunuloj lecionojn pri nutrohigieno, rilato inter nutra dieto kaj sano, sekreto de longviveco k.a.

Iu maljunulo paralizita en la gamboj antaŭ 20 jaroj estis akceptita en la bonstatigan servon. En la komenco, ĉiufoje, kiam oni faris al li resanigan masaĝon, li ŝvitegis kaj nokte ne dormis bone. Li turmentiĝis kaj la resaniga efiko ne estis rimarkinda. Dank' al partopreno de diversaj aktivadoj kaj pacienca persvado de medicinistoj, la maljunulo finfine povis ĝoje kunlabori kun ili en la resaniga trejnado. Post du monatoj li povis ne nur stari sin apogante sur objekto, sed ankaŭ bicikli pli ol 200 cirklojn.

En la korto mi renkontis esploristinon de la Medicina Instituto por Maljunula Resanigo. Ŝi konigis al mi, ke rapide multiĝas ĉinaj maljunuloj, nur en Pekino estas 1.2 milionoj da maljunuloj, kiuj konsistigas 10.4% de la totala loĝantaro de la urbo. En 2025 la loĝantara strukturo karakteriziĝos per granda procento de maljunuloj. Kiel disvolviĝanta lando, Ĉinio ankoraŭ ne havas sufiĉan ekonomian forton por nutri kaj resanigi ĉiujn maljunulojn per si mem. Tre malmulte da maljunuloj povas loĝi en bonstatiga servo, tial la plejparto de la maljunuloj devas esti zorgata de lokaj resanigaj institucioj kaj de siaj familianoj.

La parolema mezaĝa esploristino daŭrigis, ke la vivbazo de ĉiu handikapulo ja estas la loko, kie li loĝas. La disvolvo de la loka resaniga laboro dependas de ĝia ekonomia forto, kaj la nivelo de la loka resaniga laboro spegulas tiun de la tuta lando. Ĉinio direktas sian atenton al konstruado de bazaj higienaj institucioj kaj funkciigas higienajn retojn en la kvartaloj de la urboj grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj kaj en la vasta kamparo. Tiuj retoj kreis bonajn kondiĉojn disvolvi la lokan resanigan laboron. En Pekino funkcias pli ol 200 tiaj resanigaj hospitaloj kaj kuracejoj, kiuj reprezentas la direkton de la resaniga afero de Ĉinio en la estonteco. ■

## ŜTELISTO KAJ KLERULO


Bildoj de **CAO LIUFU**

1. Iuvespere ŝtelisto englitis en la domon de malriĉa klerulo por ion ŝteli. Sed li ne atendis, ke en la domo estas nenio ŝtelinda.

2. La ŝtelisto retiriĝis kun malplenaj manoj, kraĉis kaj grumblis: "Malriĉulo!"

3. Aŭdinte tion, la malriĉa klerulo haste elprenis kelkajn monerojn el sub la kapkuseno kaj postkuris la ŝteliston.

4. Li donis la monerojn al la ŝtelisto kaj petis, ke ĉi tiu ne malkaŝu lian malriĉecon.



ZENG QINGNAN:

# Antikva ĉigong-terapio

HODIAŬ en Ĉinio 20 milionoj da personoj sin ekzercas per ĉigong. Kial oni tiel fervore sin okupas pri ĝia ekzercado? La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke ĝi estas bonefika en la kuracado kaj korposanigo.

En Pekino funkcias dekkelkaj ĉigong-kuracejoj. Antaŭ nelonge mi vizitis du el ili kaj propraokule vidis kaj persone spertis la mirindan ĉigong-terapion.

## ĈIGONG-A AKUPUNKTURO

En la Ĝenerala Hospitalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo situanta en la okcidenta antaŭurbo de Pekino laboras kuracisto Huang Xiaokuan (Hŭang Ŝjaŭkŭan). Kiam mi vizitis lin, li estis okupata je kuracado de paciento.

La paciento estis Sun Jianrong (Sun Ĝjanĵong). Pro malatento antaŭ 2 jaroj li falis de loko 12 metrojn alta kaj eksuferis lumbovertebran kunpreman frakturon kaj fariĝis paraplegiulo. D-ro Huang staris je unu metro for de la lito kaj komencis kuraci la malsanulon per ĉigong-terapio. Kun moviĝo de la brakoj de d-ro Huang, la malsanulo kuŝanta en la lito levis kaj mallevis jen la manojn, jen la piedojn, klinis sin jen antaŭen, jen malantaŭen , kvazaŭ tele-regata roboto.

Post la kuraco mi demandis la pacienton, tiu respondis: "Kuracate, mi sentis la tutan korpon varma kaj miajn piedojn pli fortaj." D-ro Huang kuracis lin jam 30 fojojn kaj nun li estas fidoplena pri la resaniĝo.

La alia paciento kuracata de d-ro Huang estis Lan Mengli, kiu suferas de kunprema frakturo de nuka vertebro kaj nekompleta vertebra lezo.

D-ro Huang petis la pacienton trankvile kuŝi en la lito, duonfermu siajn okulojn kaj malstreĉu la tutan korpon. Li komencis kuraci la malsanulon per ĉigong. Komence la paciento moviĝis malrapide kaj iom post iom sin turnis en la lito. Post 20 minutoj d-ro Huang finis sian kuracadon kaj la paciento denove kvietiĝis.

La paciento diris al mi, ke dum la kuracado, li sentis varmon, ŝvelon, pezon, formikadon kaj tiradon, kvankam lia menso estis klara, tamen li moviĝis senvole, kvazaŭ regata de iu speciala forto.

Huang kuracis per ĉigong-a akupunkturo. Li konigis al mi, ke tiu terapio estas taŭga por kuraci plurajn malsanojn, kiaj afekcioj en la nerva sistemo, digesta sistemo, kardiovaskula kaj cerebra-vaskula funkcioj kaj seksfunkcio. Ĝi estas utila ankaŭ al kuracado de iuj malfacile kuraceblaj malsanoj kiaj hemiplegio, paraplegio kaj kancero.


## RESANIGI KANCERULON

En la kuracejo de Huang Xiaokuan pendas silka flago, sur kiu legiĝas "SHAOLIN-A ĈIGONG, MIRINDA POR KURACI KANCERULOJN". La flago estas donacita de konstruisto Zhang Hongxin (Ĝang Hongŝin) kaj lia familio. (Shaolin estas budhisma templo sur Songshan-monto, Henan-provinco, Ĉinio. La uŝu-o de Shaolin estas fama tra la tuta lando kaj ĝia ĉigong estas miriga.)

En februaro, 1986, oni diagnozis, ke la 32-jara Zhang Hongxin estas atakita de stomaka kancero. Oni faris al li operacion, sed post 9 monatoj oni malkovris, ke grava afekcio okazis al lia hepato. Lin turmentis akra doloro. Por kvietigi lian doloron oni ĉiutage injektis al li morfinon. Post nelonge ĉe liaj akselo kaj ingveno aperis fabograndaj limfonodomoj.

Per ĉigong-a akupunkturo d-ro Huang kuracis lin 20 fojojn kaj li ĉesis preni la medikamentojn. La refoja ekzameno de la hospitalo montris, ke malaperis la limfonodomoj kaj ne plu doloras al li la stomako kaj hepato.

Huang Xiaokuan kuracas pacienton.



Zhang diris al mi: "Nun mi manĝas kun bona apetito, dormas dolĉe kaj sentas min bone. La lasta ekzameno montris, ke min ne trafis recidivo de la primara kancero, ĉe mi tute malaperis la metastazinta kancero. Estas d-ro Huang, kiu savis min." Nun li estas daŭre kuracata per ĉigong-terapio por plifortigi la sanon.

En la lastaj jaroj d-ro Huang kuracis dekmil malsanulojn enkaj eksterlandajn. La kuracefiko de paralizuloj de li kuracitaj atingis 66.9%, tiu de neŭrasteniuloj 82% kaj tiu de kanceruloj 95%.

"Kial la pacientoj senvole moviĝas sekvante vin, kiam vi ilin kuracas?" mi demandis.

"Tion kaŭzas la energio eligita el mia korpo," li respondis. "La modernaj sciencaj instrumentoj post ekzameno montris, ke miaj manoj kaj okuloj eligas ultraruĝan elektromagnetan ondon, statikan ŝargon, sekundaran sonondon k.a, kiam mi kuracas malsanulon per ĉigong."

"Ĉu tio ne signifas, ke vi donas al la kuracato energion kaj regas ilian movon?"

"Mi ne regas lin. La energio eligita el mia korpo povas glatigi lian ĝinlŭo-vojon kaj akceli lian sangocirkuladon, kio estas utila al lia resaniĝo."

Oni diras, ke la energio eligita de ĉigong-istoj estas bonefikaj por subigi la kancerajn ĉelojn kaj eĉ mortigi ilin. Tio estas konkludo akirita post 360-foja imunologia ekzameno per ĉigong-terapio.

## ESPLOR-RIGARDI LA INTERNAJN ORGANOJN

En la suda antaŭurbo de Pekino mi intervjuis ĉigong-iston Zhao Xuezhong (Ĝaŭ Ŝjŭeĝong), kiu povas klare rigardi tra la vestoj la internajn organojn de homo.

Lia diagnozo al paciento estas eksterordinara. Li ne palpas la pulson de paciento, nek aŭskultas konigon de la kuracato. Li rigardas la pacienton nur per siaj nudaj okuloj kaj povas precize malkovri la afekcian parton de la paciento kaj ĝian historion.

Mi petis lin fari por mi ekzamenon. Kun rideto li petis min kuŝiĝi. Li staris je unu metro for de mi, trarigardis mian tutan korpon kaj petis, ke mi kuŝiĝu surventre. Li refoje trarigardis min kaj diris: "Ne bone funkcias viaj stomako kaj intestoj. Vi sentas ventroŝveliĝon, sed ne doloron. Antaŭe vin turmentis stomaka malsano, sed nun vi resaniĝis. Ĉu mi pravas?" Vere mi suferis de ulcero de duodena bulbo kaj nun jam resaniĝis. "Antaŭ longe grave vundiĝis via maldekstra maleolo." Kun miro mi rigardis lin. Li refoje trafe diris. En 1959 mi tordis la maldekstran maleolon en korbopilkado kaj mi kuŝis 3 monatojn en hospitalo. "Vi havis malsanon ankaŭ en la talio. Ĉu ne?" Mi ne povis plu teni min silenta kaj diris: "Mi suferis de protrudiĝo de lumba intervertebra disko."

## KURACISTIĜO POST LONGA MALSANO

Post kelkaj tagoj mi intervjuis s-ron Zhao refoje. "Kial vi povas vidi la internajn organojn de homo tra vestoj?"

"Mi mem ne povas eksplikі tion klare, sed fakte mi klare vidas kaj neniam eraris."

"Ĉu vi rigardas ilin per ĉigong, viaj okuloj aŭ via cerbo?"

"Nek per la okuloj nek per la cerbo. Laŭ la teorio de la ĉina medicino mi rigardas per mia menso." Mia dubo restis nesolvita.

Estas interese, ke tiu mirinda kuracisto Zhao antaŭe estis serioza malsanulo. Li estis metallaboristo de la Pekina Fabriko de Fadenaj Disaŭdigaj Aparatoj. Mezaĝa li suferis multajn malsanojn, kiaj korpulma malsano, rena kreviĝo kaj lumbo- vertebra malsano. Li kuŝis en hospitalo 13 fojojn en kelkaj jaroj. Liaj kolegoj ŝerce nomis lin "mumio".

Aprile de 1983, kun deziro resaniĝi li komencis lerni ĉigong. Li lernis rapide kaj diligente. Ĉiutage li ekzercis 3-4 horojn. Tiel pasis du monatoj. Lia sanstato pli kaj pli boniĝis. Ekster lia atendo li liberigis sin de la malsanoj. Li fariĝis vigla kaj facilmova. En la okuloj de aliaj li fariĝis tute alia homo.

Iunokte, li sin ekzercis refoje per ĉigong kaj subite kreviĝis la fluoreska lampo. Li anstataŭigis ĝin per nova lampo, sed ĝi kreviĝis denove. Li do ne kuraĝis daŭrigi sian ĉigong-ekzercadon. Li konsultis ĉigong-iston. Tiu diris, ke eble lia ekzercado kaŭzis fortan resonancon de la ĉirkaŭa magneta kampo kaj pro tio kreviĝis la lampo. Li ne portis brakhorloĝon, nek tuŝis televidilon kaj aliajn hejmajn elektrajn aparatojn, ĉar ili tuj perturbiĝas je lia tuŝo. Kaj post nelonge aperis miriga afero. Ekzercante sin per ĉigong, li vidis internajn organojn de iu apudstaranto kvazaŭ bildon sur televidila ekrano. Kiam li turnis sian rigardon al iu alia, li klare vidis ankaŭ ties internaĵojn, eĉ la medolojn kaj sangvazojn. Ankaŭ Zhao mem miris pri tio. Poste li komprenis, ke tio estas eksterordinara kapablo induktita de lia ĉigong-ekzercado.

Por atingi tiun nivelon, ĝenerale oni devas ekzerci sin per ĉigong dekojn da jaroj kaj eĉ la tutan vivon, kaj iuj bezonas helpon de majstra ĉigongisto, sed Zhao sukcesis en du monatoj.

Ĉigong savis Zhao el morto. Poste li eklernis kuraci aliajn per ĉigong-terapio. Lia unua kuracato estis lia patrino longe kuŝanta paralize en la lito. Poste li senpage kuracis multajn malsanulojn. Antaŭ 4 jaroj li starigis Ĉinmedicinan Kuracejon Huayi. En la okuloj de pacientoj li fariĝis mirkuracisto.

Zhao ne aprobis la laŭdon. Li opinias, ke ĉigong-terapio en Ĉinio havas longan historion, sed oni ne konas ĝian teorion. Tio estos studobjekto de la scienco pri vivoj en la 21-a jc. ■

# Ĉinmedicina prevento kaj kuracado de oftaj malsanoj (II)

**ASTMO KAJ FAJFSPIRO:**

Ili estas samspecaj malsanoj, sed iom diferencaj unu de la alia. Astmo karakteriziĝas per malfacila spirado kaj fajfspiro per sonoj en la gorĝo, paciento de fajfspiro suferas ankaŭ astmon, sed tiu de astmo foje suferas fajfspiron, foje ne.

Por kuraci astmon ĉinmedicinaj kuracistoj aplikas simplajn receptojn. Se la astmosuferanto sentas varmon, morozon, soifon, konstipiĝas, ŝatas malvarman manĝaĵon kaj sputas malfacile kaj malmulte, la mukaĵo estas viskoza kaj flava, la urino estas flava kaj malmulta, dum la ellasado la paciento sentas la urinon varma, oni povas glutigi al li pulvoron de bakitaj blankaj lumbrikoj per bolinta akvo kun blanka sukero, trifoje ĉiutage kaj 5 g. ĉiufoje . Se la paciento tusas en astmo, sputas blankan mukaĵon, ŝvitas, kapdoloras, timas malvarmon kaj la membroj estas malvarmaj, oni povas preskribi al li 6 g. da efedro, 20 g. da eriobotriaj folioj kaj 20 g. da folioj de *huduizi* (*Elaeagnus pungens*), dekokti ilin kaj trinkigi al li la dekoktaĵon dufoje ĉiutage. Se la paciento tusas pro multa mukaĵo, sentas la bruston ŝvela, sufoka aŭ dolora, spiras malfacile kaj devas spiri per la buŝo, oni povas preskribi al li *shihouzi*-on (*Tetrastigma hemsleyanum*), fritilarion kaj platikodonon po 6 g., dekokti ilin kaj trinkigi al li la dekoktaĵon de unu dozo dufoje ĉiutage. Se la paciento suferas astmon multjare, aspektas pala kaj febla, spiras malfacile kaj anhelas je movo, oni povas preskribi al li 60 g. da juglando, 15 g. da *buguzhi* (*Psoralea corylifolia*) kaj 3 g. da skizandraj fruktoj, dekokti ilin kaj trinkigi al li la dekoktaĵon de unu dozo dufoje ĉiutage. Ankaŭ popola recepto donas certan efikon, ekz-e, por kuraci astmon oni povas uzi sep blatojn, forigi la piedojn kaj flugilojn, baki kaj pulvorigi ilin, engluti la pulvoron per varmeta bolinta akvo, unufoje ĉiutage.

**KONSTIPO:**

Estas multaj kaŭzoj por konstipo, kiaj hemoroidoj, korpulenteco, tumoro stomaka aŭ intesta, ascito, senila distrofio, longa sidado, gravedeco kaj kronikaj malsanoj.

Ĝenerale laŭ malsama kaŭzo de malsano ĉinmedicinaj kuracistoj preskribas al konstipaj suferantoj de abdomena ŝveliĝo, doloro, buŝa amaro, putra spiro kaj malbona apetito. Ili ofte alprenas ankaŭ jenajn metodojn por forigi la konstipon.

A. Varma konstipo: La pacientoj suferas lipsekadon, soifon, varmon, putran spiron aŭ buŝan amaron, kaj sentas la abdomenon ŝveliĝa aŭ dolora, la okuloj kaj vizaĝo estas ruĝaj, la urino estas flava kaj malmulta, ili ofte estas en malbonhumoro. Por forigi la varmon kaj faciligi la fekadon, oni povas trinkigi al ili duonglason da sezama oleo per bolinta rizlava akvo.

B. Malvarma konstipo: La suferantoj plejparte estas palaj, malfortaj kaj langvoraj, havas ruĝetan langon kun maldika blanka tegaĵo kaj malfortan pulsadon, la fekaĵo estas nek seka nek malmola. Por kuraci la malsanon oni devas tonike fortigi la vitalan energion kaj malseketigi la inteston. Se la pacientoj suferas lienajn kaj stomakajn malfortiĝon kaj malvarmiĝon, oni povas manĝigi al ili rizan kaĉon preparitan per infuzaĵo de 30 g. da perila (*Perilla frutesceens*) semo kaj 15 g. da kanaba semo.

C. Melankolia konstipo: La pacientoj sentas la bruston sufoka, la abdomenon ŝvele dolora, ene gason moviĝanta kaj la fekadon malfacila kaj ne havas apetiton. Por kuraci la malsanon, oni devas faciligi gasellason kaj fekadon. Tiucele oni povas trinkigi al ili densan dekoktaĵon el 30 g. da *qingxiangzi* (*Celosia argentea*), kun mielo, aŭ trinkigi al ili dekoktaĵon el 10 g. da sterkulia semo, 10 g. da abrikota kerno kaj 12 g. da *trikosanta* (*Trichosanthis*) ŝelo.

Krome, ĉinmedicinaj kuracistoj alprenas ankaŭ eksteran fekelkondukadon kaj manĝaĵ-terapion por forigi konstipon. Tiaj manĝaĵoj estas nigra sezamo, juglando, pinsema kerno aŭ mielo. La suferantoj de kutima konstipo devas sin teni ĉiam en bona humoro, modere sin ekzerci per sporta aktivado, moderigi la manĝadon kaj sin kutimigi al fekado en difinita tempo. ■

# LA HEBEI-OPERA TRUPO TURNEANTA EN MONTARO



Post scenejo

Teksto de **ZHENG ZHENJIE**

Fotoj de **HAI FENG**

De la infaneco mi ŝatas Hebei-operon de mia hejmloko Hebei-provinco. Mi pasie admiras tiun lokan operon. Ĉi-printempe mi havis la ŝancon kunvojaĝi kun la Hebei-opera Trupo de Miyun-gubernio de Pekino en ĝia turneo en kamparo, kaj dank' al tio, mi denove ĝuis la belegan kantadon.

Plejparto de la geaktoroj estis junuloj. Multaj el ili diplomiĝis en 1987 el la Hebei-opera kurso de la Pekina Teatra Lernejo. Iuj estis sunbrunaj kredeble pro la longtempa turneado en la kamparo kaj preskaŭ ne distingeblaj disde la kamparanoj.


La direktoro de la trupo Wu Xianming (U Ŝjanming) kaj reĝisoro Wang Mingqi (Ŭang Mingĉji) estis talentaj kaj parolemaj. En la aŭtobuso ili diris al mi, ke ĝeneralan depresion alfrontas la malgrandaj teatraj trupoj de la ĉina kamparo, kion kaŭzis ĉefe la ŝanĝiĝo de la intereso de multaj junuloj. Ili ŝatas modernajn artojn, kiaj filmo, televido, muziko, danco k.s., sed ne kiel iliaj gepatroj, al kiuj plaĉas la tradiciaj lokaj operoj. En la lastaj jaroj, pro la rapida altiĝo de la prezaro, la geaktoroj devis pli multe elspezi dum turneado, kaj ju pli multe ili prezentis, des pli rapide grandiĝis la deficito. Nun restas nur kelkaj el la dekoj da trupoj de loka opero en Pekino.


"Ĉu la ŝtato subvencias vian trupon kiel antaŭe?" mi demandis la direktoron.

"Jes. Ĉiujare la ŝtato subvencias

En tualetejo







Aktoroj paŭzas por manĝo

nian trupon per 72 000 juanoj."

"Ĉu sufiĉas la monsumo por via elspezo?"

"Ĝi ne estas sufiĉa eĉ por salajri la 60 membrojn de la trupo."

"Kiel do vi vivtenas la trupon?"

Direktoro Wu diris al mi, ke por altiri pli da rigardantoj, la trupo prezentas, krom Hebei-opero, ankaŭ varieteojn ŝatatajn de junaj

Prezentado por kamparanoj



kamparanoj. La trupo fondis malgrandan fabrikon de metiartaĵoj, en kiu laboras 18 membroj de la trupo, kiuj ne taŭgas por turneado en la kamparo. La bildkadroj produktitaj de la fabriko vendiĝas en la ĉirkaŭaĵo. La tri aŭtoj de la trupo faras transportadon kontraŭ pago. En 1988 tiuj rimedoj donis al la trupo 130 000 juanojn kaj la turneado 120 000 juanojn. La kresko de enspezo plibonigis la vivon de la trupanoj. Kaj krome, la trupo per 65 000 juanoj aĉetis grandan moveblan teatron el ŝtalaj stangoj kaj blanka nilona teksaĵo. La starigita teatro longas 74 metrojn kaj larĝas 46 metrojn. Interne de ĝi estas scenejo, ŝminkejo, tenejo de rekvizitoj, kabineto de direktoro kaj partero por 2 000 homoj. Dank' al la teatro, la trupo povas fari prezentadon en ĉia ajn vetero. En 1988 la trupo prezentis por kamparanoj pli ol 200 fojojn en la teatro.


Veturante sur glata ŝoseo, la aŭtobuso jen trairis tritikan kampon, jen preterpasis la glimantan akvokonservejon Miyun. Multaj aŭtoj kuradis sur la vojo, portante ekskursantojn el la urbo kaj kamparanojn vizitontajn teatron.

Je duono post la deka antaŭ la subĉiela scenejo kolektiĝis ĉ. mil rigardantoj starantaj aŭ sidantaj. Iuj knaboj sidis sur pirarboj en plena florado. La montoj kun kaskadoj kaj la lazura ĉielo servis kiel la fono de la scenejo. En muziko de la orkestro la aktoroj ŝminkitaj paŝis sur la scenejon. Ili en antikvaj kostumoj prezentis kvar aktojn el la tradiciaj dramoj pri lukto kaj amo. Same kiel aliaj lokaj operoj, Hebei-opero estas tre malfacila por prezenti. Sur la scenejo estas malmulte da rekvizitoj, kaj la enhavo de la dramo estas esprimita ĉefe per kantado kaj parolo. Ĉiuj movoj de la manoj, ĉiuj paŝoj kaj eĉ ĉiuj rigardoj estas ligitaj kun la intrigo de la teatraĵo. La 21-jara aktorino Wang Yanfang estas lerta ludi viran rolon. Ŝiaj superba prezento kaj ora voĉo estas ĉiam akompanataj de longa aplaŭdado. Mi mallaŭte parolis kun la apudsidanta avo Liu Mengfu. Li aĝas 81 jarojn kaj iras per iom malfacilaj paŝoj. Sed li ŝatas teatron. Tiutage li frue ellitiĝis kaj venis al la loko, piedirinte dek kilometrojn da montvojo.

"Nun ni turneas en la kamparo, sendube, ni devas bone servi al la kamparanoj," diris reĝisoro Wang post la scenejo. Por ke pli multaj kamparanoj povu rigardi la prezentadon, la trupo ofte prezentas kelkfoje en unu tago seninterrompe.

Nokte la lacaj geaktoroj dronis en dolĉa dormo, dume direktoro Wu kaj reĝisoro Wang interparolis kun mi en sia kabineto.

Spektantoj






En la fabriko de metiartaĵoj fondita de la trupo

Mi informiĝis de ili, ke por ŝpari elspezon la trupo ofte pasloĝas en la movebla teatro aŭ en domoj de kamparanoj. En la lastaj jaroj multaj kamparanoj konstruis novajn domojn kaj ili volonte cedis la domojn al la geaktoroj. Kontraŭ tio la mastroj de la domoj petis nur kelke da teatraj biletoj. ■



Kantado de populara kanto

# NOVAJ ESPERANTAJ LIBROJ




*KAMELO ŜJANGZI,* romano verkita de la fama ĉina verkisto Laŭ Ŝe (1899-1966). La verko priskribas la tragikan sorton de rikiŝisto Ŝjangzi en la malnova Pekino por konigi la mizeran vivon de la ĉinaj laboruloj en la 30-aj jaroj.

La romano estis elĉinigita de Ŭang Ĉongfang kaj la bildo sur la kovrilo kaj kvin ilustraĵoj estis faritaj de Gaŭ Ĵongŝeng. La aldonita skema mapo de Beiping (Pekino) helpas vian legadon.

Formato: 148 x 210 mm. 328 p., bindita, eldonita en 1988.

*KURIOZAJ FLOROJ KAJ ARBOJ* estas bela studinda albumo, en kiu estas kolektitaj 160 specoj de raraj pereontaj plantoj kaj famaj floroj, inter kiuj troviĝas antikvaj citeacoj, ekonomie valoraj plantoj, seme utiligataj plantoj kaj dekoraciaj plantoj kun ok famaj floroj de Yunnan-provinco kiel la ĉefaj. La albumo kun 176 koloraj bildoj estas bone presita kaj bindita.

Formato: 184 x 258 mm., 160 p., eldonita en 1988.

*TIBETO SUR LA MONDA TEGMENTO* estas albumo ĉiuflanke prezentanta Tibeton. La aŭtoroj, kiuj longtempe vivis en Tibeto, per abundaj historiaj materialoj kaj surlokaj intervjuoj vivece kaj konkrete prezentis la historion, pitoreskejojn kaj antikvajn kulturon kaj arton de Tibeto kaj konigis la vivon, morojn kaj religian kredon de tibetanoj kaj ŝanĝiĝojn de la loko post la demokratia reformado. La albumo kun 140 koloraj bildoj estas bone presita.

Formato: 190 x 260 mm., 132 p., bindita, eldonita en 1987.

Eldoninto: Ĉina Esperanto-Eldonejo, P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Distribuanto: Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

## ABONTARIFO DE EPĈ

(ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

| lando | valuto | 1 jaro | 2 jaroj | 3 jaroj |
|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | AUD | 15.00 | 25.00 | 35.00 |
| Aŭstrio | ATS | 200 | 340 | 480 |
| Belgio | BEF | 550 | 930 | 1300 |
| FR Germanio | DEM | 30.00 | 50.00 | 70.00 |
| Britio | GBP | 8.00 | 13.60 | 19.00 |
| Finnlando | FIM | 64.00 | 108.00 | 150.00 |
| Francio | FRF | 90.00 | 150.00 | 210.00 |
| Hispanio | ESP | 1200 | 2000 | 2900 |
| Italio | ITL | 18000 | 30600 | 43000 |
| Japanio | JPY | 3000 | 5400 | 7500 |
| Jugoslavio | YUD | 3000 | 5400 | 7500 |
| Nederlando | NLG | 34.00 | 58.00 | 82.00 |
| Nov-Zelando | NZD | 20.00 | 34.00 | 48.00 |
| Portugalio | PTE | 1100 | 1800 | 2600 |
| Svisio | CHF | 25.00 | 42.00 | 60.00 |
| Usono | USD | 12.00 | 20.00 | 28.00 |
| Kanado | CAD | 14.00 | 23.00 | 33.00 |
| **Por aliaj landoj en Eŭropo:** | | | | |
| | GBP | 8.00 | 13.60 | 19.00 |
| | USD | 10.00 | 17.00 | 24.00 |
| **Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:** | | | | |
| | GBP | 5.00 | 8.50 | 12.00 |
| | USD | 6.50 | 11.00 | 16.00 |

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# Sur stepo

Pentraĵo de ZHOU RONGSHENG

La pentraĵo estas delikatlinia. Per troigo la aŭtoro figuras paŝtantajn mongolojn en norda Ĉinio.

La mongola nacieco estas ĉina naciminoritato laborema kaj kuraĝa, kun longa historio. La mongoloj vivas plejparte en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. En la regiono paŝtiĝas mongolaj ĉevaloj. La paŝtistoj loĝas en jurtoj kaj prenas viandojn de bovo kaj ŝafo kaj ties lakton kiel ĉefajn manĝaĵojn kaj trinkaĵon. Ili lertas en rajdado kaj pafado, kantado kaj dancado.



# Tibetana mezlernejo en Pekino

Teksto kaj fotoj de **SUN GUOLIANG**

Ĝi estas mezlernejo ordinara kaj ne ordinara. En ĝi lernas 11-14-jaraj tibetaj geknaboj, kies gepatroj ne estas en Pekino. Ĝiaj instruado kaj administrado diferencas de tiuj de aliaj mezlernejoj en Pekino. La lernejo estas destinita por kulturi konstruantojn por Tibeto.

Antaŭ la paca liberigo en Tibeto tute ne estis kariero de edukado, sed dum la 30 jaroj de post la liberigo la edukado multe disvolviĝis. Ĝi faris siajn kontribuojn al la tibetaj konstruado, socia progreso kaj nacia klerigado. Sed pro diversaj kaŭzoj, ekzistas multaj urĝe solvendaj problemoj, ekz, la edukado ne povas tute kontentigi la bezonon de la konstruado; mankas kompetentuloj; ne racia estas la aranĝo de la edukado, malforta estas elementa edukado; malmultnombra kaj malaltnivela estas la instruistaro; malalta estas la nivelo de la lerneja administrado kaj malbonaj la kondiĉoj de la lernejoj. Oni povas diri, ke la edukado estas tre grava por la tibeta konstruado. Do, oni devas ne nur turni grandan atenton al la edukado en Tibeto, sed ankaŭ starigi lernejojn en aliaj lokoj utiligante iliajn favorajn kondiĉojn por kulturi fakulojn urĝe bezonatajn de Tibeto. Ĝuste por tio, la centra registaro de Ĉinio decidis en 1984 funkciigi tibetanajn kursojn en mezlernejoj de Zhejiang, Anhui, Sichuan, Shandong, Hunan kaj aliaj 12 provincoj kaj fondi tibetanan mezlernejon en Pekino, Chengdu kaj Tianjin.

En lernopaŭzo



Antaŭ nelonge, mi vizitis la Tibetanan Mezlernejon en Pekino sidantan en la norda antaŭurbo. Ĝi kovras areon de 3 hektaroj. Tie staras tibetstilaj domoj kun plankareo de ĉ. 20 000 km$^2$.

La lernejestro Zhang Lianke, eksestro de la Eduka Buroo de Tongxian-gubernio, Pekino, diris al mi, ke en 1985 la ŝtata konsilantaro kaj pekina registaro asignis 17 milionojn da juanoj por fondi la tibetanan mezlernejon. Ĝi oficiale ekfunkciis septembre de 1987. Ĉiujare la Tibeta Eduk-scienca Komisiono elektas ĉ. 100 11-14-jarajn tibetanojn, kiuj finis sian studon en elementa lernejo, kaj sendas ilin ĉi tien por la 7-jara studado. 80% el ili estas infanoj de kamparanoj kaj paŝtistoj.

Enirinte en la lernejon, la geknaboj relernas studobjektojn por la elementlernejanoj unujare kaj poste lernas 3 jarojn en malsupera mezlernejo. Diplomiĝinte, plejparto de la geknaboj daŭrigas sian studon en teknikaj mezlernejoj, dum la elstaraj geknaboj eniras en superan mezlernejon, kies lernantoj ĉefe estas eminentaj lernejanoj, kiuj finis sian studon en malsuperaj mezlernejoj de la 17 provincoj. La plejparto de la diplomiĝintoj de la supera mezlernejo post ekzameno studas en altlernejoj. Nuntempe, 180 geknaboj lernas en tiu mezlernejo. Ekde 1989 ĝi akceptos unuaklasajn superajn mezlernejanojn. La lernejo kun 260 instruistoj kaj funkciuloj maksimume akceptos 700 lernantojn.

Mi ĉeestis matematikan kurson de unuaklasaj mezlernejanoj' kaj konstatis, ke la geknaboj rapide kaj prave komprenas la lecionojn, aktive kaj ĝuste respondas la demandojn de la instruisto. En la lernado ili estas neniom malpli bonaj ol la samklasaj geknaboj de aliaj nacioj de nia lando.

La lernejestro Zhang diris al mi, ke tiuj lernantoj havis tre malaltan klerecon je la komenco post kiam ili venis en la lernejon. En 1987, kiam la unuaj lernantoj estis akceptitaj, oni ekzamenis ilin. Nur

6.9% de ili sukcesis en la matematika ekzameno kaj 8.58% de ili sukcesis en la lingva ekzameno. Tial ili devas unue relerni en la prepara kurso kaj post tio daŭrigi sian studon en la mezlernejo. Tamen estas malfacile lerni suplemente en unu jaro sciojn, kiujn oni ĝenerale lernas en 3 jaroj. "Tamen ni havas la plej favorajn kondiĉojn. Niaj instruistoj estas eminentaj. Ili estas elektitaj el pluraj element- kaj mezlernejoj de Pekino. Ili estas spertaj en edukado, precipe en la edukado de la elementlernejanoj. Laŭ la ĉinaj ĝeneralaj instruaj materialoj por elementaj lernejoj niaj instruistoj kompilis instruaĵojn por prepara kurso tre taŭgajn al lernejanoj en posedo de ĉefaj scioj en mallonga tempo. Tiel, ili renkontas malpli da malfaciloj en la mezlernejo."

Zhang daŭrigis, ke la plej granda malfacilo por ili estas la lingva baro. Pro tio, la lernejo pliigis la hanlingvan kaj matematikan lernohorojn. Koncerne la hanlingvan lecionon oni trejnas la geknabojn per voĉlegado, aŭskulto de sonbendo, rigardo de bildobendo kaj interparolado kun instruistoj. Iutage post duona jaro la lernejo lasis ĉiujn lernejanojn promeni en la komerca kvartalo de Pekino, por ke ili mem demandu pri vojo, prenu aŭtobuson, aĉetu manĝaĵojn kaj marĉandu kun vendistoj, sed antaŭe en tia afero ilin ĉiam gvidis instruistoj. Ĉifoje, ili ĉiuj sukcesis. Krome, la lernejo aranĝis tibetlingvan kurson ĉiusemajne en la regulaj horoj por altigi la nivelon de tibeta lingvo de la geknaboj.

Sen lingva baro, oni faris ĉion facile. Post unu jaro, ĉiuj lernejanoj trapasis la ekzamenon. En la lingva ekzameno 76% de la geknaboj estis eminentaj kaj en la matematika ekzameno 74% eminentaj.

En la unua jaro de ilia studo en la lernejo, oni aranĝis la geknabojn viziti turismajn lokojn, muzeojn, altlernejojn kaj grandajn fabrikojn. Tio larĝigis ilian vidkampon kaj ekscitis ilian entuziasmon en la lernado.



Muzikilludo

En la dormoĉambroj de lernejanoj mi trovis, ke iliaj litkovriloj, littukoj, lankovriloj, pantofloj kaj lavpelvoj estas bonordaj kaj samkoloraj. La lernejestro Zhang diris al mi, ke la geknaboj lernas ĉi tie senpage, la ŝtato pagas ĉion por ili. Iliaj ĉiutagaj bezonaĵoj estas distribuitaj de la lernejo.


La geknaboj plejparte estas malpli-ol-13-jaraj kaj sekve ne povas bone zorgi pri si mem en la vivo. La lernejo do fondis administracion, kiu speciale zorgas pri ilia ĉiutaga vivo. Ĝiaj funkciuloj instruas al ili ordigi la litaĵojn kaj ĉambron kaj lavi por ili vestojn kaj litkovrilojn. En nokto laboras specialaj deĵorantoj. La lernejaj kuracistoj zorgas pri ilia sano kaj de tempo al tempo faras fizikan ekzamenon por la geknaboj. Krome la geknaboj povas senpage konsulti kuracistojn en la proksima hospitalo.

Tagmeze mi vizitis la manĝejon por lernejanoj. Tie oni preparis plurajn tibetajn manĝaĵojn, kiaj buter-teo, teo kun lakto kaj farunaĵo el bakitaj hordeo kaj faboj. Ĝenerale, ili havas ĉiu 3 pladojn viandajn kaj legomajn. Kuiristo diris al mi, ke ili ofte faras al la geknaboj ankaŭ bongustaĵojn preferatajn de la hanoj, kiaj vaporumitaj pasteĉoj, ĝjaŭzi-oj, frititaj kukoj, dabingoj, panoj, frititaj kokoj kaj brogita ŝafaĵo. La lernejo ĉiutage donas al ili ankaŭ fruktojn.

7 monatojn post ilia enlernejiĝo oni faris al ili fizikan ekzamenon kaj trovis, ke la knaboj kreskis meznombre je 3.75 cm, kaj la knabinoj je 2.22 cm, la korpopezo de la knaboj pliiĝis meznombre je 4.75 kg. kaj tiu de la knabinoj je 4.9 kg.

En la postlecionaj horoj mi rigardis, kiel la geknaboj ludas piedpilkon kaj korbopilkon, kuras kaj faras aliajn sportojn. Ili kiel gajaj ĉevaletoj viglas sur la ludkampo. Aŭdiĝis melodiaj orkestraj muzikoj el klasĉambro. Mi iris tien kaj vidis, ke tie juna instruisto gvidas siajn lernantojn en ludo de instrumentoj. Kvankam ili ludas nelerte, tamen tio estas ja ne facila por la infanoj venintaj el paŝtistaj familioj. Mi informiĝis de la lernejestro Zhang, ke la tibetaj geknaboj ŝatas muzikon. Ili diligente ekzercis sin en la ludado. Ili havas muzikan lecionon 2-foje semajne. La lernejo ofte okazigas artan prezentadon en la festaj tagoj. Maje de 1988, en la pekina kantkonkurso la lernejo gajnis la unuan lokon kaj knabino Yangjin gajnis la oran premion en la kantkonkurso de pekinaj mezlernejanoj. Oni diris, ke la juna muzika instruisto decidis kulturi la unuan orkestron de la tibetaj mezlernejanoj.

Ĉe la adiaŭo, mi demandis iun apudstarantan knabon: "Ĉu vi ŝatas la lernejon?" Li respondis senpripense: "Jes, la lernejo estas nia granda familio kaj la geinstruistoj prizorgas nin, kiel niaj gepatroj." ■






La lernejestro inter lernantoj


Uŝu-o, sporto ŝatata de lernantoj

En legoĉambro





Malpura akvo de fabriko fluas en la kanalon.



Instalaĵo por trakti malpuran akvon en Changzhou

# Kial malaperis la klara fluo de la antikva kanalo?

Teksto de **HUA GUOWEI**

Fotoj de **XU PENG**

LA Granda Pekin-Hangzhou-a Kanalo estas fiero de la ĉinoj. De multaj jaroj ĝi kun fluo klara abundis je fiŝoj kaj salikokoj. Sur la kanalo navetadis transportaj ŝipoj. Ĝi ne nur estis trafika arterio inter sudo kaj nordo de Ĉinio, sed ankaŭ alportis grandajn plezurojn al la ĉebordaj loĝantoj. Tamen, kun disvolviĝo de industrio en la ĉebordaj regionoj, la kanalo estas serioze poluciita. Kontraŭ la antikva kanalo malbonodoranta, oni ofte plendas: "Kial malaperis la klara fluo de la antikva kanalo?"

La kanalo kun totala longo de 1 700 km. komenciĝas de Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio, kaj finiĝas en la turisma urbo Hangzhou. Nun la poluciita surfaco de la kanalo tagon post tago etendiĝas de urboj al kamparo, de la regionoj industrie evoluintaj al tiuj subevoluintaj. Raporto diras, ke en la lastaj jaroj la nigra fluo de Hangzhou etendiĝis eksteren pli ol 60 km., kaj daŭre rampas al klarakva regiono.

Hangzhou estas la plej fama turisma loko ĉe la antikva kanalo. En 1949 ĝi havis nur 500 000 loĝantojn, ĝia industria produktovaloro estis malpli ol cent milionoj da juanoj. Tie ĉe la kanalo funkciis nur 33 fabrikoj. Multaj ŝipoj fiŝkaptis sur la kanalo. En 1983 la nombro de la loĝantoj de Hangzhou jam atingis 1 010 000 kaj ĝia industria produktovaloro kreskis al 5.56 miliardoj da juanoj. Ĉe la kanalo aperis pli ol 200 novaj fabrikoj, kiuj ĉiujare ellasas 200 milionojn da tunoj da malpura akvo en la kanalon. La plej freŝa raporto diras, ke la polucio ĉiujare kaŭzas al Hangzhou ekonomian perdon, kiu konsistigas 2% de ĝia totala produktovaloro.

Purigita parto de la kanalo



Fakte, damaĝo de la polucio estas plurflanka, ekz. la polucio malutilas al akvoproduktaĵoj, ekologia ekvilibro kaj la renomo de Hangzhou kiel "paradiza urbo", kio estas malfacile prezentata. Iu luksa plezurŝipo iranta sur la kanalo malprosperas tagon post tago en la servado, ĉar ĉiutage centoj da eksterlandaj turistoj forlasis veturadon sur la kanalo ĉe la "paradiza Hangzhou", ne tolerante la malbonodoron de la kanalo. Iuj eksterlandanoj ŝerce diris: "Se fetoron oni flaras, la kanalo ja proksimas."

Esploristo Jin Lunian, laboranto de la Mediprotekta Instituto de Zhejiang-provinco, ne prenis tiujn vortojn kiel ŝercon. Li diris: "Hangzhou prosperiĝis pro la kanalo, kaj eble ankaŭ depresios pro ĝia polucio." Li plurfoje trovis mortintajn fiŝojn flosantajn sur la kanalo, kiam li kolektis specimenojn ĉe la kanalo. Li diris, ke sen efikaj rimedoj la kanalo ne evitos fatalon.

En Wuxi-gubernio de Jiangsu-provinco la kanalo longas 28 km., ambaŭborde de ĝi funkcias pli ol 300 fabrikoj, kiaj la galvanizaj, prestinkturaj kaj kemiindustriaj. Pro disvolviĝo de la kamparaj entreprenoj la jara industria produktovaloro de la gubernio atingis proksimume 7 miliardojn da juanoj kaj per tio ĝi okupas la unuan lokon inter ĉiuj gubernioj de Ĉinio, dume diversaj venenaj akvoj ellasitaj de tiuj fabrikoj ŝanĝis la koloron de la kanalo.

Polucio de la kanalo minacas agrokulturon, fiŝadon, ekologian ekvilibron kaj trinkakvon de la ĉebordaj regionoj. Reguligo de la kanalo estas neprokrastebla. Tamen, multaj ankoraŭ ne konas la seriozecon de la problemo. La urbo Wuxi ĉiutage ellasas 400 000 tunojn da malpura akvo en la kanalon. Mediprotekta departemento postulas, ke la fabrikoj ekipu sin per malpurakvo-trakta instalaĵo. Sed foje oni trovis, ke la malpurakvo-traktaj maŝinoj normale laborantaj en fabriko konsistigas nur 46%. Ĉiutage oni elakviĝas pli ol 30 tunojn da flosaĵoj. La kanalo ĉe la limregiono inter la urbaj kvartaloj kaj ĝia antaŭurbo terure mallarĝiĝis pro amasego de ruboj.

Iu ŝtatoficisto diris: "Disvolvo de industrio estas prava, tamen polucio devas esti sufiĉe atentata." En la lastaj kelkaj jaroj koncerna departemento decidis malpermesi plue konstrui poluciantajn industriajn entreprenojn ĉe la kanalo. Serioze poluciantaj fabrikoj jam estas malkonstruitaj kaj translokitaj. Oni ankaŭ seriozigas la monpunon al la poluciantaj entreprenoj. Pro polucio de la kanalo la akvo-proviza fabriko de Suzhou ne povis trovi taŭgan lokon por preni bonkvalitan akvon, tial la urbo faris projekton fosi novan kanalon, kiu ĉirkaŭfluos la urbajn kvartalojn. La realigo de tiu projekto jam

komenciĝis en 1987. Ĝia totala investo estas 50 milionoj da juanoj. La nova kanalo longos je 9 km., larĝos je 70 metroj. La koncerna departemento opiniis, ke la antikva kanalo pliigos sian mempurigan povon pro konstruo de la nova kanalo, kaj la polucio kaŭzita de transportado, irigaciado k.a. relative malpliiĝos.

En la pasinteco la reguligo de la kanalo strikte ligiĝis kun la navigacio kaj akvoutiligo. Nun, iuj lokoj kombinis la reguligon de la kanalo kun la ampleksa reguligo de la urbomedio. Tiuflanke la industria urbo Changzhou gajnis grandajn sukcesojn. Ekde 1983 en la urbo, investinte 36 milionojn da juanoj, oni larĝigis la ŝanelon ĝis 50 metroj, elfosis 1.53 milionojn da kubmetroj da tero kaj konstruis 11.7 km. da granita bordo. Pro tio oni malkonstruis kaj translokis ĉiujn kadukajn domojn ĉe la bordoj, verdigis 100 hektarojn da tero kaj instalis kloakon longan je pli ol 10 km.

Tiuj konstruoj de Changzhou jam donis sian efikon: La kanalo fariĝas iom post iom klara, fiŝoj kaj salikokoj malaperintaj antaŭ multaj jaroj denove reabundiĝis, kaj novaj parkoj altiras al si pli kaj pli multe da turistoj.

Bedaŭrinde, ke la kanalo en la urbo Changzhou longas nur je pli ol 10 km. Kvankam tiu malgranda klara fluo alportas al la loĝantoj ian memfidon por venki la polucion, tamen ne eblas granda pliboniĝo en reguligo de la kanalo dum mallonga tempo, pro manko de pli grandskala kontraŭpolucia konstruaĵo sur la kanalo.

La plej ŝlosila kaj plej malfacila problemo en reguligo de la kanalo estas manko de mono por la ĉina mediprotekta departemento. Tio rezultigis malfortecon de mediprotektado, postiĝintecon de kontrolrimedoj kaj nesufiĉecon de iuj teknikaj instalaĵoj. Lastatempe mediprotektaj fakuloj faris ekzamenon pri nombro de bakterioj ententaj en la kanalo, ĉe Weishanlago en Shandong-provinco. La donitaĵoj montras, ke tie la enteno de la malutilaj bakterioj superis la normon je 100%. Kaj plie la ekzamenantoj deklaris: "La ekzamena donitaĵo eble estas neĝusta pro teknikaj kondiĉoj."

Nun, estas multaj raportoj pri la polucio kaj proponoj pri reguligo de la kanalo, la ŝtato donis milionojn da juanoj por plenumi esplorajn taskojn en diversaj lokoj. Oni povas diri, ke teorie oni jam estas pretaj por radikale likvidi la polucion de la kanalo. Tiel, la problemo pri monrimedoj fariĝis pli grava. Laŭ takso de la urbo Hangzhou, por tute malaperigi la malbonodoron de la kanalo 100 km. longa en Hangzhou, oni bezonas 300 milionojn da juanoj. Tamen la vicurbestro Xu Yunhong diris: "Hangzhou ĉiujare asignas nur 30 milionojn da juanoj por la urbokonstruado kaj rekonstruado de la bazaj instalaĵoj." Evidente, malgraŭ la kontinua pliiĝo de ĝia industria produktovaloro, estas malfacile prepari sufiĉan sumon por radikale forigi polucion de la kanalo.

Rimedoj alprenataj de Hangzhou estas plue fosi ŝanelon longan je ĉ. 7 km. en la fino de la kanalo, kunligi la kanalon kun Qiantang-rivero, konduki la riverakvon en la malpuran regionon de la kanalo tra granda kluzo en difinita tempo, por altigi la mempurigan povon de la tiea preskaŭ stagnanta akvo. La loĝantoj de Hangzhou diris, ke ili efike plibonigis la akvokvaliton de la pitoreskejo Okcidenta Lago per la samaj metodoj. Nun jam fundamente plenumiĝis la "interkomunikiga konstruo de la kanalo kun Qiantang-rivero", kun totala investaĵo de 70000000 juanoj. ■


Analizistino de la traktejo de malpura akvo


Fiŝkaptado denove en la kanalo


LAN SHAN:

# Kuriozaj klinitaj turoj



Huzhu-turo

Turo en Suizhong-gubernio



LA preĝeja turo de Pizo en Italio famas tra la mondo pro sia klineco je 5°6' kaŭzita de la sinkado de la bazo. Ĉi tie ni konigas al vi ĉinajn klinitajn turojn.

Sur la monto Yuquan (Juĉjŭan) de Dangyang-gubernio, Hubei-provinco, staras okangula kaj 13-etaĝa milbudha ferturo 17.9 m. alta. Ĝi estis konstruita en 1061 el 53 000 kg.da krudgiso. La monto etendiĝas de sude norden, tie furiozas norda vento en vintro. Laŭ la projekto oni konstruis la supran parton de la turo kliniĝantan norden je 1°5' por ĝin stabiligi en atako de la norda vento. Tiu ĉi plej alta ferturo en Ĉinio nun ankoraŭ majeste staras sur la monto.

Guilong-turo okulfrapas sur la ŝtona insuleto en la centro de Zuojiang(Zŭoĝjang)-rivero de Chongzuo(Ĉongzŭo)-gubernio en la Guangxi(Gŭangŝji)-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono. Ĝi, 25 m. alta, sesangula kaj kvin-etaĝa, estis konstruita en 1371 el ligno kaj brikoj. La turo estas klinita je ĉ. 1° laŭ la projekto. La projektinto plene konsideris pri la influo de vento, fluo kaj bazo sur ĝi. Aparte menciindas, ke en la pasintaj 300 jaroj ĝi eltenis la atakon de ventegoj kaj inundoj.


Huqiu(Huĉiŭ)-turo en Suzhou (Suĝoŭ) de Jiangsu(Ĝjangsu)-provinco konstruiĝis en 959. Ĝi estas okangula kaj sepetaĝa brikturo. En konstruado la korpo kliniĝis pro neegala sinkado de la bazo. Ĉiufoje, kiam oni riparis ĝin, oni ĝustigis ĝian klinecon. Tamen tio ankoraŭ ne povis haltigi la kliniĝon. En 1976 la soklo fendiĝis kaj rompiĝis ĝiaj brikoj. Post 4-jara riparado komencita en 1981, la kliniĝo kaj sinkado de la turo estas haltigitaj. Nun la centro de la supro de la turo devias de la centro de ĝia bazo je 2.32 m, kaj la klineco de ĝia korpo estas 2°47'.

Huzhu-turo sur Tianma-monto en Songjiang-gubernio de Ŝanhajo konstruiĝis en 1079 el brikoj kaj ligno. Ĝi kun alto de 18.82 m. estas sepetaĝa kaj okangula. Fajrego forbruligis ĝiajn lignajn internan subtenilon kaj ŝtuparon. Tial oni ne frekventis ĝin dum longa tempo. Foje, oni trovis antikvajn kuprajn monerojn en ĝiaj brikfendoj, kio altiris multajn homojn, kiuj subfosis la bazon por serĉi trezoron. 200 jarojn antaŭe, ĉe ĝia nordokcidenta angulo estis fosita truo kun diametro de 2 m., kaj la turo kliniĝis sudorienten je 6°52'. Ĝi ŝajnas esti falonta en ajna tempo, tamen ĝi ankoraŭ staras nun.

Huzhu-turo ne estas la plej grave klinita turo en Ĉinio. La turo de Suizhong(Sujĝong)-gubernio, Liaoning-provinco, kliniĝis je 12° en 1965. La brikturo el 3 etaĝoj kaj kun alto de ĉ. 10 m. konstruiĝis en Liao-dinastio (907-1125). Ĝi havas po unu elirejon en la kvar flankoj. La brikoj surhavas belajn gravurajojn. Oni diras, ke nelonge post sia finkonstruiĝo la turo iom post iom kliniĝis pro la sinkado de la bazo. Longtempe ne riparite, ĝiaj supra kaj malsupra partoj estas grave eroziitaj. En centoj da jaroj ĝi eltenis la atakon de tertremoj kaj inundoj, kaj tiel ĝi fariĝis miraklo de nordorienta Ĉinio.

La brika kaj ŝtona Suojianglou-turo de la urbo Jiujiang (Ĝiŭĝjang), Jiangxi-provinco, estis konstruita en 1585. Ĝi estas sepetaĝa, kun alto de ĉ. 35 m. kaj en formo de sesedra konuso. Ĝi iom post iom kliniĝis pro la erozio de vento kaj pluvo kaj la atako de tertremo en la pasintaj 400 jaroj. Precipe en 1938, la turo estis trafita trifoje de kanonado de japanaj agresantoj, tamen ĝi ankoraŭ staras ĉe Yangzi-rivero kiel la simbolo de la urbo.

La pitoreska Yunnan-provinco havas multajn antikvajn turojn. Sur la monto Cangshan de Dali staras 19 montpintoj, ĉiu kun turo. Plejparto de la turoj jam falis post fortaj tertremoj. La nun ekzistantaj tri turoj de la templo Chongsheng kaj Shegu-turo kliniĝis en malsamaj gradoj. Estas pli mirinda la Arboĉirkaŭita Turo en la urbo Mangshi. Ĝi estas budha pagodo, konstruita el brikoj kaj ŝtonoj antaŭ 500 jaroj. Neniu scias, kiam elkreskis banjano el ĝia supro. La arbo bone kreskis en milda klimato, ĝiaj radikoj etendiĝis en la teron sub la turo. Ĝi altas je pli ol 20 m. kaj preme klinis la turkorpon, tamen la dikaj radikoj strikte ĉirkaŭprenas la turon, tiel ke ĝi ne falas. Tio prezentas mirindan spektaklon, ke la arbo ĉirkaŭas la turon. ■


Unu el la tri turoj en Dali


Suojianglou-turo

---

## POR KOMENCANTOJ

# Instruistino

Ŝi estas ordinara ĉina virino, instruistino de mezlernejo. Ŝi instruis 34 jarojn kaj baldaŭ pensiiĝos. La 34-jara instruado estas malfacila por ŝi, patrino de tri infanoj, ŝarĝita per pezaj instruaj kaj hejmaj laboroj.

Antaŭ 22 jaroj la 33-jara instruistino Zhou (Ĝoŭ) jam havis du infanojn: la 9-jaran filon kaj 4-jaran filinon. La oficejo de ŝia edzo estis sufiĉe malproksima, ke li devis veturi pli ol duonhoron por ĝin atingi. Li estis tre okupita. Tial instruistino Zhou prenis sur sin ĉiujn hejmlaborojn.

Foje ŝia filino malsaniĝis. Pro neĝustatempa kuracado ŝi eksuferis de sekvaĵo.

De tiam la instruistino devis flegi sian filinon post la instruado, krom prepari lecionojn kaj fari hejmlaborojn. Ofte okazis, ke matene, kiam la instruistino estis ironta al sia lernejo, la filino kroĉiĝis al la patrino kun peto, ke la lasta restu iom pli longe ĉe ŝi. La instruistino tamen rifuzis, pensante, ke ŝiaj lernantoj atendas ŝin en la klasĉambro. Kiam la filinon reatakis nokte la malsano, ŝi venigis kuraciston, flegis ŝin, dormis mallonge kaj en la sekvanta mateno iris al la lernejo kiel kutime.

Ŝi havis multe da lernantoj. Iuj el ili nun studas en altlernejoj aŭ laboras en fabrikoj, kamparo aŭ registaraj institucioj kaj aliaj fariĝis ŝtatoficistoj aŭ teknikistoj. Ŝi diligente laboras kiel antaŭe. Ŝi dediĉis 34 jarojn al klerigado de infanoj. Kiam ŝi eklaboris kiel instruistino, ŝi estis juna, naiva kaj vigla, sed nun ŝi fariĝis maljuna, kun grizaj haroj ĉe la tempioj. Iuj opinias, ke ŝi vane laboradis kaj nenion akiris. Sed ŝi sentas sin feliĉa, ke ŝi estas amata de sennombraj geknaboj. ■

# Bilanco omaĝa al Ludovikito

de **RIKARDO ŜULCO**

*iam kompletigota plena verkaro de l.l.zamenhof* (parto dua), volumo 2 *de mickieviĉ al goethe*, volumo 3 *de molière al ŝalom-alejhem*, volumo 4 *de moseo al andersen* (1988) eldonejo ludovikito (Nagoja Esperanto-Centro). 500, 502 kaj 504 paĝoj; 15,5 x 21,5 cm. La volumoj estas lukse aranĝitaj. Sub brile nigra ŝirmkovrilo kun blanka plantovinjeto kaŝiĝas la hele bruna, velureca kartono de la librobindaĵo kun ĝia pompa ora dorso-titolo. La papero estas bonega, la preso klara.

Tiuj tri volumoj kune kun la unue aperinta volumo 1 (eldonita en 1984) DE PATRONIA AL ŜEKSPIR, 1887-1903, kaj la du grandaformataj volumoj 5 kaj 6 (eldonitaj en 1987) DE JOSUO AL JEREMIA kaj DE JEĤEZKEL AL MALAĤI nun prezentas kiel kompletan la duan parton de la plena verkaro de L.L. Zamenhof. Ĝi ampleksas la tradukaĵojn. Ties kronologia aranĝo apartigas la unuopajn tekstojn el la Malnova Testamento. Tiun malavantaĝon oni povas, se bezone, facile kompensi per ekzemplero de la tuta Biblio. La avantaĝo, certe salutata de historiistoj, estas, ke tiu aranĝo permesas agrablan kaj detalan postsperton de la Zamenhofa lingvoevoluo. Al tio kontribuas ankaŭ la aŭtentikeco de la tekstoj kun iliaj eraroj, ĉu presaj, ĉu plumaj. Jen malfermiĝas vasta esplorkampo por niaj erudiciaj Esperantologoj.

La dua volumo enhavas, krom kelkaj tekstoj el la Malnova Testamento, la dramojn LA REVIZORO, LA RABISTOJ kaj IFIGENIO, du fabelojn de **Andersen**, kelkajn versojn el SINJORO TADEO kaj komentan postparolon de Ludovikito.

La tria volumo krom LA SENTENCOJ DE SALOMONO, enhavas la dramon GEORGO DANDIN, du versaĵojn de **Heine**, la romanon MARTA, la PROVERBARON, la monologon LA GIMNAZIO kaj ree postparolon de Ludovikito, tiuĉifoje kun "babilaĵo" pri la nomoj de Zamenhof. LA SENTENCOJ, laŭ alia eldono, kaj LA GIMNAZIO, laŭ tajposkripto, aperas duan fojon apendice.

Pli ol duonon de la kvara libro plenigas la PENTATEŬKO. Sekvas LA RABENO DE BAĤARAĤ kaj la FLUGANTA KOFRO de **Andersen**. Ĉio estas fotorepresoj de la unuaj eldonoj en LA REVUO de la firmao Hachette. La finon faras avizo el LA REVUO, tajposkripto de LA RABENO DE BAĤARAĤ kiel aldono kaj la Ludovikita postparolo, kiu kulminas en lia konstato, ke li "per tiu ĉi volumo finfine povis prezenti al niaj estimataj legantoj la plenan 'Ludovikan veron' senmanke."

Pli frue ja kompletiĝis jam la unua parto de la iam kompletigota plena verkaro de Zamenhof. Ĝi konsistas unue el dek volumoj. Ili estas: 1. UNUAJ LIBROJ POR ESPERANTISTOJ 1887 ĝis 1888; 2. NI LABORU KAJ ESPERU! 1887 ĝis 1891; 3. ANTAŬEN AL LA LABORO! 1892 ĝis 1895; 4. TAMEN LA AFERO PROGRESAS 1896 ĝis 1900; 5. HEBREO EL LA GETO 1859 ĝis 1901; 6. KUN GRADAJ PAŜOJ EKSTERLANDEN! 1901 ĝis 1904; 7. KLOPODIS ORGANIZI, SED VANE! 1905 ĝis 1906; 8. POR KAJ KONTRAŬ REFORMOJ! 1907 ĝis 1908; 9. MORTINTA, SED SENMORTA! 1909 ĝis 1917; 10. POSTRIKOLTO DE LUDOVIKAĴOJ 1883 ĝis 1916. Sed tio ne sufiĉis! La materialo akumuliĝis kaj devis esti lokata. Por konservi la kronologian intersekvon de la volumoj, Ludovikito komencis interŝovi la bisajn volumojn. Ekzistas do apud la unua, kiel 1-bis, ankaŭ LA INKUNABLOJ DE ESPERANTO 1887 ĝis 1889; apud la sesa, kiel 6-bis, ankaŭ LA FRANCA PERIODO DE ESPERANTO 1901 ĝis 1903 kaj apud la sepa, kiel 7-bis, ankaŭ LA NEFORGESEBLAJ KONGRESOJ 1905 ĝis 1906. Antaŭvidataj estas 8-bis KIEL ESPERANTO VENKIS 1907 ĝis 1908 kaj 9-bis KONFLIKTOJ INTER ESPERANTISTOJ 1909 ĝis 1911. Neniu, eble eĉ ne Ludovikito mem, scias, ĉu tio nun validas kiel fino.

Kaj ekzistas ankoraŭ alia valvo! Post la unua kaj dua jam kompletigitaj partoj Ludovikito malfermis trian parton nomante ĝin Kromkajeroj. Da ili aperis jam kvar, tri laŭvicaj kaj unu bisa. Jen ili: 1. SENLEGENDA BIOGRAFIO DE L.L. ZAMENHOF; 2. KORESPONDADO LUDOVIKOLOGIA kun la 2-bisa POST LA IELTIELA KOMPLETIĜO kaj 3. LUDOVIKOLOGIAJ BIOGRAFIETOJ. En perspektivo estas jam tri pliaj: 4. AŬTOGRAFOJ DE LUDOVIKO; 5. LUDOVIKAJ VORTAROJ EL LA 19-A JARCENTO kaj 6. LETEROJ DE SEBERT AL LUDOVIKO. Ludovikito do estas plantinta arbon vivofortan, kiu ne ĉesas ĉiam estigi vivofortajn ŝosojn.

En sia kromkajero 2-bis, p. 230 ĝis 260, Ludovikito represis longan vicon da recenzoj pri sia laboro, aperintaj de 1973 ĝis 1985. Ili respegulas bonan vojostrekon el la historio de Esperanto, peras ĝustan impreson pri la graveco de la Ludovikita persista eldonada aktiveco kaj imponas ankaŭ pro la nomoj de elstaraj Esperantistoj, kiuj ne malestimis okupi sin pri ĝi: **Haupenthal**, **Waringhien**, **Minnaja**, **Boulton**, **Verloren van Themaat**, **Lins**, **Berveling**, **Ragnarsson**, Ergoto de Bonaero. Trafolumante kelkajn revuojn, mi trovis en "esperanto" 80/12 ankoraŭ tre legindan recenzon de **Boris Kolker**: "Eldona monumento por Zamenhof". Li parolas pri la "plej aŭdaca eldona entrepreno en la Movado" kaj citas ankaŭ tre atentindajn Zamenhofajn eldirojn. Ankaŭ mi mem plurfoje skribis recenzojn pri Ludovikito, kies legadon aŭ relegadon mi ĝentile rekomendas al la interesiĝinta leganto. (Vestfalujaj Flugfolioj numeroj 53, 65, 77, 92; "esperanto" 83/6; "l' esperanto" 85/11-12; La Gazeto 88/4.) ■

## ESP-NOVAĴOJ

● Membro de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj fama entomologo profesoro Io Chou faris paroladon kun la titolo "Reformi la fremdlingvan instruadon kaj lernigi Esperanton al la elementaj lernejanoj" en la dua plena sesio de la Sepa Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Ĉinio okazinta marte de la nuna jaro. Li proponis, ke la Eduka Komisiono de Ĉinio faru provon en unu aŭ du mez- kaj elementlernejoj en urboj kun necesaj kondiĉoj, lernigu al la lernantoj Esperanton 2-3 jarojn kaj poste al ili aliajn fremdajn lingvojn. Li opinias, ke tio estas la plej bona rimedo reformi la fremdlingvan instruadon.

● La Kantona Televizio elsendas programon de Esperanto-kurso de la 12-a de marto kaj la elsenda tempo estas 18:10-18:30 de lundo ĝis ĵaŭdo semajne. Ĝi estas la 5-a nur post la televizioj Qinghai, Shenyang, Changchun kaj Liaoning, kiuj funkciigas Esperanto-kurson.

● La Pekina Aeronaŭtika kaj Astronaŭtika Universitato kaj Pekina Esperanto-Asocio kune funkciigas korespondan Esperanto-kurson, en kiu lernas pli ol 400 kursanoj el 29 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj. La kurso daŭros duonjaron. En la 19-a de marto okazis la inaŭguro en la nomita universitato. En ĝi donis vortojn membroj de la Akademio de Esperanto Laŭlum kaj L.H. Knoedt (Brazilo).

● La "Ĉina-Esperanta Vortaro pri Scienco kaj Tekniko" kompilita de Zhang Jinliang estis eldonita en Hefei, Anhui-provinco, Ĉinio. Ĝi enhavas 40 000 artikolojn, kiuj koncernas matematikon, fizikon, kemion, biologion, medicinon, geologion, aeronaŭtikon, astronomion, radion, radaron, komputilon k.a.


● La libro "Nia Korpo", verkita de famekonata japana anatomiisto profesoro Hisinari Hazime, estis eldonita de la Xinjiang-a Popola Higiena Eldonejo en februaro kiel ĉina-Esperanta legaĵo. Ĝi servas kiel faka libro por medicinisto-esperantistoj. La ĉinan tradukon plenumis Zhao Zhongqin kaj Guo Xuyi.

● En la konferenco okazinta inter la 23-a kaj 25-a de januaro, 1989 en Moskvo esperantistaj delegitoj el la tuta Sovetunio decidis forlasi la Asocion de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) kaj refondi la malaperintan en 1938 organizaĵon "Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU)".

● La en diversaj lingvoj aperanta kaj al multaj landoj distribuata revuo "Soveta Uzbekistano" nun havas ankaŭ Esperantan rubrikon, per kiu oni instruas Esperanton al ĉiuj ĝiaj legantoj, kaj ĝi enhavas E-novaĵojn kaj literaturaĵojn. Abonon petu de "Sovetskij Uzbekistan", Lenin-str. 41, SU-700 000, Taŝkento, USSR.


● Esperanto-klubo, loka grupo de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Tiebič, aranĝos someran Esperanto-tendaron en Lančov, Ĉeĥoslovakio, en tri etapoj, nome 2/7-15/1989, 16/7-29/7 kaj 30/7-12/8. La instruado de Esperanto okazos ĉiutage krom dimanĉo de la 8-a ĝis la 12-a horo en kvin diversgradaj kursoj.

● Omaĝe al la 100-jariĝo de Esperanto d-ro Arpad MATHE komencis kompili kompletan bibliografion de planlingvaj periodaĵoj en kunlaborado kun du hispanaj kolektantoj-esperantistoj jam antaŭ du jaroj. Por kompletigi la bibliografion ili bezonas helpon de diverslandaj kaj diversfakaj samideanoj, kiuj aŭ informas ilin pri la periodaĵoj, neposedataj de ili, aŭ sendas al ili la necesajn revunumerojn. Adreso: d-ro Arpad Mathe, Tusnadi u. 14, H-1125 Budapest, Hungario.



Esperanto-societo en Turku, Finnlando, aranĝis Esperanto-standon en "Ŝatokupa Foiro" en novembro 1988.

Balo aranĝita de la Pekina Esperanto-Asocio por bonvenigi la Esperantistan Turisman Grupon de Pollando



Por praktiki Esperanton per legado de EPĈ, membroj de la Venezuela Esperanto-Unuiĝo kunvenas en la parko "Las Peonias" de Maracaibo.



VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (31)

# En la naskoloko de la unua tekstilejo de Ĉinio

Teksto de GAO FENG
Fotoj de YANG XIUYUN kaj SHEN CHEN

YANGZI-RIVERO enmarigas 1000 miliardojn da kubmetroj da akvo ĉiujare kaj samtempe portas 480 milionojn da tunoj da ŝlimo al sia malsupra baseno. La ŝlimo iom post iom formis sabloinsulon kaj grundon. Nun la grundo ankoraŭ etendiĝas orienten kun rapideco de 40 metroj ĉiujare. Pro tio la enfluejo de Yangzi-rivero aspektas kiel kloŝo. Ambaŭflanke de ĝi etendiĝas la fama Yangzi-delto. Pro la abundaj produktoj kaj riĉfontoj ĝi estas nomata ankaŭ la Ora Delto. Tie situas la nova industria urbo Nantong.

## HAVENO ĈE LA ENMARIĜO DE YANGZI-RIVERO

Mi veturis per ŝipo de Zhenjiang (Ĝenĝjang) al Nantong. Jen kaj jen aŭdiĝis sirenado de ŝipoj kaj fiŝistaj boatoj velis sur la rivero. Kiam mia ŝipo proksimiĝis al Nantong, miajn okulojn frapis kvin unuopaj montetoj, kiuj viciĝis de sudoriento al nordokcidento. Sur iuj montetoj estas antikvaj pagodoj, ĉe monttalioj — pavilonoj kaj kioskoj. Mi pensis, ke Nantong kredeble estas montoza regiono.


Surbordiĝinte mi trovis, ke en Nantong-regiono estas neniu alia monto krom la menciitaj. Ĝia tero de 8000 kvadrataj kilometroj estas ebena kaj fekunda. Tie vivas 7.4 milionoj da Nantong-anoj.

Konanto de la Nantong-a historio diris al mi, ke antaŭ 2000 jaroj Yangzi-rivero enmariĝis ĉe la nunaj Zhenjiang kaj Yangzhou (Janggoŭ), kaj Nantong-regiono tiam dormis sub akvo. Post longtempa aluviado aperis la terpeco Nantong. En 958 oni konstruis urbon tie kaj nomis ĝin Tongzhou (Tongĝoŭ). Nur en la komenco de la kuranta jarcento ĝi alinomiĝis Nantong.

Kun la Flava Maro oriente kaj Yangzi-rivero sude, Nantong estas naturdotita haveno ĉe la enmariĝo de la rivero. Veturinte de tie per ŝipo, oni povas atingi havenojn laŭ la marbordo de la ĉina kontinento

Kajo de Nantong-haveno






Parto de Nantong

Pitoreskejo ĉe Jangzi-rivero





Alilandaj turistoj vizitas fabrikon de Nantong. Foto de **ZHU ZHENGWANG**

kaj tiujn de aliaj landoj; kaj laŭ la navigvojoj de Yangzi-rivero kaj ties branĉoj oni povas atingi ankaŭ 15 provincojn kaj municipojn enlande. Vere oportuna trafiko.

La geografie ideala pozicio metis bazon por la prospera akva navigado de Nantong.

Mi promenante spektis la havenon ĉe la fino de Yangzi-rivero.


Nantong-haveno sur ebena kaj rektlinia bordo longas je 26 km. La rivero tie larĝas, la plej granda larĝo estas 8 km. La akvo profundas je 11-20 m. La navigvojo sen ŝlimo ne glaciiĝas vintre kaj tial navigado viglas tutjare. Kvar gigantaj grizaj kajoj etendiĝas ĝis la rivero, sur ili svarmas ŝip-atendantoj kaj adiaŭantoj. La tri ŝarĝejoj posedas dekkelkajn ankrejojn, kies jara ŝarĝ-malŝarĝa kvanto atingas 10 milionojn da tunoj. La haveno estas en ekspansiado. Laŭ takso, je la fino de la kuranta jarcento la haveno povos ŝarĝi kaj malŝarĝi 35 milionojn da tunoj da kargo. Nun la navigado funkcias inter Nantong-haveno kaj 36 havenoj de 26 landoj kaj regionoj, kiel Japanio, Usono kaj Sovetunio. Ĝi ludas pli kaj pli gravan rolon en akcelo de la komerco inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj en disvolvo de la ĉina ekonomio.

## LA DISVOLVIĜO DE LA MALPEZA KAJ TEKSTILA INDUSTRIOJ

Nantong-anoj ofte mencias la nomon Zhang Jian (Ĝang Ĝjan) kaj lian kontribuon al la hejmloko.

Tiu sukcesinto en la supera kortega ekzameno de Qing(Ĉing)-dinastio (1644-1911) funkciis kiel industria ministro kaj poste agrikultura-komerca ministro en la komenca periodo post la fondiĝo de la Respubliko de Ĉinio (1912-1949). En 1896 li rezignis sian oficon en registaro kaj revenis al Nantong. Li fondis tie la unuan tekstilejon de Ĉinio — la ŝpinejon Dasheng. Poste li fondis aliajn tri teksejojn, kiuj posedis sume 1 300 teksilojn kaj 160 000 spindelojn. Tio iom post iom faris la kotondonan regionon Nantong lulilo de la moderna ĉina nacia tekstila industrio.

Post tio, Zhang Jian investis por fondi 20 entreprenojn de fer-fandado, ole-premado, rizsenŝeligo, elektro-produktado, alumeto-farado, transportado, ter-



Nova kvartalo



kulturado kaj brutobredado. La nacia industrio en Nantong rapide evoluis. Komence de la kuranta jarcento Nantong jam fariĝis urbo kun la plej prospera nacia industrio en Ĉinio.

Kun la florado de la moderna nacia industrio, Zhang Jian turnis sian investadon al la eduka kaj kultura aferoj. Li uzis profiton el la entreprenoj por konstruado de instruista, agronomia kaj komerca lernejoj, medicina kolegio kaj muzeo.

De tiam pasis jam duona jarcento. La nacia industrio de Nantong, malgraŭ la zigzaga vojo, metis bazon por la evoluo de la tiea ekonomio. La nomo de Zhang Jian, patriota industriisto, jam estas enskribita en la modernan historion de Ĉinio. La popolo de Nantong neniam forgesos lin.


Feliĉe mi vidis Zhang Xuwu (Ĝang Ŝju'u), vicestron de Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco, nepon de Zhang Jian. Li diris al mi: "Mia avo faris sian kontribuon por Nantong, sed nur en la lasta jardeko Nantong fariĝis havenurbo konata pro siaj malpeza kaj tekstila industrioj." Trafe. En la 80-aj jaroj la nombro de tekstilaj entreprenoj en Nantong kreskis al 30, ankaŭ la produktoj multiĝis kaj estas 830 specoj de 15 kategorioj, kiaj kemifibra, lana, lina, silka kaj kotona teksaĵoj. La urbo havas 5 000 entreprenojn, kiuj formas industrian sistemon el branĉoj mekanika, elektronika, kemia, medicina, konstrua, manĝaĵa k.a., kun malpeza kaj tekstila industrioj kiel la kerno. En la lastaj jaroj la produktovaloro de industrio de la urbo kreskis je 12% ĉiujare. La urbo jam enviciĝis inter la avangardaj urboj, kies industria produktovaloro superas 10 miliardojn da juanoj. Multaj neefektivigeblaj revoj de Zhang Jian nun realiĝis. Parolante pri tio, Zhang Xuwu kun emocio diris: "Mia avo estus ja kontenta, se li vidus la grandan ŝanĝiĝon de la hodiaŭa Nantong."

## EKFLUGI PER DU FLUGILOJ


Promenante en Nantong mi trovis, ke tie mankas altaj domoj kaj grandiozaj trefkruciĝoj, tre malmultas luksaj personaŭtoj kaj novaj superaj hoteloj. La urbo aspektas iom malnova, kio ŝajne ne respondas al ĝia pozicio kiel unu el la 14 malfermitaj urboj marbordaj difinitaj en 1984. Sed kiam mi intervjuis respondeculojn de koncernaj departementoj de la magistrato, mi eksciis la radikalajn ŝanĝiĝojn de la urbo.


Kiel malfermi la pordon al la ekstera mondo kaj evoluigi la poreksteran ekonomion? La gvidantaro de Nantong laŭ konkreta cirkonstancaro faris ĉefe du aferojn: unu estas enkonduki avangardajn teknikojn kaj reformi la ekzistantajn entreprenojn; kaj la alia estas plifortigi la konstruadon de fundamentaj instalaĵoj kaj energie plibonigi investan medion. Ili komparas la du aferojn kun "du flugiloj de birdo". Birdo ja ekflugas per du flugiloj. Sen fortaj flugiloj ĝi ne povas flugi alten kaj malproksimen.

La malpeza kaj tekstila industrioj de Nantong havas bonan bazon, sed la instalaĵoj estas multe postiĝintaj post la nova teknologio de la nuna mondo. Por enkonduki avangardajn teknikojn necesas sufiĉe da fremdaj valutoj. Por tio ili antaŭ ĉio evoluigis produktadon de eksportaĵoj. Dank' al la kunlaboro de la komerca, industria kaj agrikultura departementoj, kompletiĝis tri departementoj por eksporti agrikulturajn produktojn, ĉiutagajn uzaĵojn kaj elektrajn aparatojn. 300 entreprenoj kaj miliono da muoj (1 muo = 1/15 hektaro) da agroj servas rekte por eksportado. Inter la eksportaĵoj la kvantoj de kotono, kokono, kotonfadeno, ŝtofo, mentolo, citrona acido k.a. estas kompare grandaj. 350 specoj de varoj vendiĝas en 90 landoj kaj regionoj. Multiĝo de fremdaj valutoj garantias la enkondukon de teknologio kaj instalaĵoj.



Moderna pasaĝerŝipo, kiu veturas de Nantong al Ŝanhajo






Laborejo de la Dua Tekstilejo de Nantong



En la Mentola Fabriko de Nantong

Tradicia katuno produktita en Nantong



Malgranda laborejo de la Dua Tekstilejo de Nantong fariĝis sintezfibra fabriko post apliko de enkondukitaj avangardaj teknikoj kaj instalaĵoj. Ĝia produktado iras aŭtomate kaj kontinue kun okulfrapa ekonomia profito. En duono de la difinita tempo ili gajnis la profiton, kiu kovris la kapitalon de la fabriko.

Krome, Nantong utiligas ankaŭ fremdajn investojn en sia ekonomia disvolviĝo. La kompanio Liwang (Li'ŭang) en la orienta antaŭurbo estas entrepreno funkciigata de Ĉinio kaj Japanio. Ĝi speciale produktas botojn por laboristoj, renomajn en Japanio, kiuj ĉiuj vendiĝas en ĝi. En la unua jaro post la ekfunkcio la fabriko jam profitis 260 000 juanojn. Ĝis 1988, Nantong sankciis sume 210 konstruojn faratajn per fremdaj valutoj, kaj la sumo de la fremdaj valutoj utiligitaj laŭ kontraktoj atingis 450 milionojn da usonaj dolaroj.

La avangardaj teknikoj kaj instalaĵoj kaj fremdaj valutoj prosperigas la ekonomion de Nantong. Nun Nantong turnas sian atenton al nova internacia merkato. Ĝi eksportas teknikojn kaj instalaĵojn al iuj disvolviĝantaj landoj, kaj al iuj evoluintaj landoj siajn produktojn kaj artojn. Ĝi ankaŭ funkciigas entreprenojn en aliaj landoj per kuna investado.

Laŭ la vojo de eksporto—enkonduko—reeksporto la ekonomio de Nantong iom post iom turniĝas al la porekstera. ■

ĈINAJ ARTOJ

# Ĉinaj figuropentraĵoj (II)

de **WANG XIUQIN**



Bonzo Qici (Song-dinastio) de **LIANG KAI**

Ĉe rivero (Yuan-dinastio) de **ZHAO MENGFU**






Knabino Damu (Nuntempo) de **LIU WENXI**

SURBAZE de la brilaj sukcesoj en Tang-dinastio iom post iom formiĝis du skoloj de figuropentraĵoj en Song-dinastio (960-1279), t.e. tiu de dikliniaj kaj tiu de maldikliniaj. (Poste la dikliniaj disvolviĝis en tuĉpentraĵojn.) La ĉefaj pentristoj estis Li Gonglin de la Norda Song-dinastio (960-1127) kaj Liang Kai de la Suda Song-dinastio (1127-1279.) Per vigla kaj varia lini-desegnado Li Gonglin prezentis homfigurojn sen uzi kolorilon, tial la linia desegnado fariĝis sendependa speco en la ĉinaj figuropentraĵoj. Liang Kai estis lerta en verŝ-tuĉado. Per dikaj linioj, densa kaj maldensa tuĉado li tre rapide kaj vivece prezentis homfigurojn. La de li simple pentrita "Li Bai en Improvizado de Versoj" montras la karakterojn kaj senĝenan sintenon de la granda poeto Li Bai.

Tiam disvolviĝis ankaŭ pentraĵoj pri ĝenroj kaj historiaj rakontoj. "Sceno apud Rivero en la Festo de Klaro kaj Brilo" farita de Zhang Zeduan (Ĝang Zedŭan) en la Norda Song-dinastio estis unu el la elstaraj ĝenropentraĵoj de tiu periodo. Ĝi montras la prosperan Bianliang (nun Kaifeng), la ĉefurbon de la Norda Song-dinastio, ambaŭflanke de la rivero Bianhe. En la pentraĵo viglas oficistoj, kamparanoj, metiistoj, komercistoj, budhistoj, taoistoj, aŭguristoj kaj kuracistoj. La viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj, ĉiuj havas apartan aspekton. Vidiĝas ankaŭ loĝejoj de ŝtatoficistoj, drinkejoj, te-trinkejoj, ĉevaloj, boatoj kaj ĉaroj. La pentraĵo atestas la artan talenton de la pentristo en arta skizado kaj lian zorgeman observadon de la ĉirkaŭaj aferoj. Ĝi liveris valorajn historiajn materialojn al la posteuloj por studi la urbajn vivon, metion, komercon, trafikon, ĝenrojn, vestojn kaj konstruaĵojn en Song-dinastio.

En Yuan-dinastio (1206-1368) aperis multaj freskoj en la temploj, kia la fama fresko en Yongle-templo de Shanxi(Ŝanŝji)-provinco. En la fresko estas 280 homoj, inter kiuj la ĉefa figuro estas majesta kaj serioza, belulinoj mildaj kaj ĝentilaj ĉiu kun aparta mieno. Ili aŭ meditas, aŭ interparolas, aŭ aŭskultas, aŭ rakontas. La fresko estas harmonia, subtila kaj grandioza, kun fortaj kaj senĝenaj strekoj.

Zhao Mengfu (Ĝaŭ Mengfu), grava pentristo tiutempa, proponis ŝanĝi la stilon de pentrado pri palaca vivo. Li insistis, ke pentraĵoj devas porti antikvajn karakterizaĵojn, kaj proponis fari kaligrafaĵojn sur ili, imitante la pikturon de la Kvin Dinastioj kaj la Norda Song-dinastio. Li alte taksis la trajtojn de pentrmaniero, sed ne la artan koncepton de pentraĵoj mem. La de li faritaj pentraĵoj forte elspiras lian personan temperamenton kaj stilon.

En Ming-dinastio (1368-1644), malgraŭ la forta restaŭra tendenco en la pikturo, la pentristoj faris figuropentraĵojn en malsamaj manieroj, sekve la tiamaj pentraĵoj pri ĝenroj kaj historiaj rakontoj kaj portretoj havis siajn apartajn trajtojn. La famaj figuropentristoj Tang Yin, Qiu Ying (Ĉiŭ Jing), Zeng Jing (Zeng Ĝing), Chen Hongshou k.a. postlasis multajn valorajn verkojn. La pentraĵoj de Tang Yin estas fortliniaj, belkoloraj kaj senĝenaj. La pentraĵoj de Qiu Ying, precipe tiuj pri belulinoj, estas precizaj en projektado,

fortaj en resumado, distingiĝaj per nigra-blanka skizado kaj alikolora desegnado, tamen al ili mankas grandioza etoso, kaj plie la homfiguroj estas tro delikataj kaj subtilaj. Zeng Jing estis lerta en farado de portretoj. En portretado li unue frotis paperon plurfoje per tuĉpeniko kaj poste kolorigis pentraĵon por doni pli da reliefo, dank' al kio li kreis novan vojon al la ĉinstilaj portretoj. Chen Hongshou estis vigla en imago kaj majstra en koncizigo kaj troigo de la internaj trajtoj de la naturaj objektoj. La de li faritaj pentraĵoj en gusto de antikveco kaj dekoracio elspiras klaran personan karakteron.


En Qing(Ĉing)-dinastio (1644-1911) oni emis imiti antikvulojn en pentrado de homfiguroj, sed en la imperiestra piktura instituto oni aplikis la ĉinan kaj okcidentan pentrartojn en kombino. Jiao Bingzhen (Ĝjaŭ Binĝen), Leng Mei, Lang Shining k.a. pentris en la okcidenta maniero, kaj formiĝis nova skolo de pentrado. La homfiguroj en la pentraĵo "Plugado kaj Teksado" de Jiao Bingzhen estis farita per la okcidenta pentrarto. Ĉar la porantikvaj personoj ne ŝatis tiun skolon, tial kun la forpaso de la protektanta imperiestro malaperis ankaŭ tiu skolo. En la lastaj jaroj de Qing-dinastio Ren Yi (Ĵen Ji) de Ŝanhajo sin liberigis de la rutino, strebis al nova pikturo kaj nova arta stilo surbaze de siaj impresoj kaj scioj pri la vivo. Li kaj liaj kamaradoj formis la ŝanhajan skolon. En farado de portretoj li asimilis artajn kvintesencojn de la popolaj portretistoj kaj aliaj pikturaj skoloj, aplikis diversajn pentrmanierojn por elstarigi la karakterojn de la pentritaj homfiguroj, tiel ke la ŝanhaja skolo levis la arton de portretado al nova nivelo.

La modernaj ĉinaj figuropentristoj heredis la eminentan tradicion de la ĉina pikturo, asimilis la okcidentan pentrarton kaj rimarkinde disvolvis ĝin en desegnado kaj kolorigado. Aperis multaj figuropentristoj kombinantaj la ĉinan pentrarton kun la okcidenta, kiaj Xu Beihong (Ŝju Bejhong) kaj Jiang




Li Duanduan (meze) (Ming-dinastio)

de **TANG YIN**




Virinoj en amuziĝo (Parto) (Qing-dinastio) de **YU ZHIDING**

Zhaohe (Ĝjang Ĝaŭhe). "Malsaĝa Avo Translokas Monton" de Xu Beihong estas horizontala rulpentraĵo. La homfiguroj en ĝi estas imponaj kaj ambaŭflanke de ili etendiĝas vastaj pejzaĝoj. Per linioj dikaj kaj maldikaj, antaŭaj kaj malantaŭaj, la pentristo plene prezentis la belon de la homa staturo kaj la homan volon venki la naturon. "Fuĝo", verko de Jiang Zhaohe kreita en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, estis farita per peniko kaj ĉina inko. Delikatesprima kaj profundpensa, ĝi estas malofte videbla en la moderna ĉina piktura historio. Li enkondukis la okcidentan skizon en la ĉinan pentrarton kaj bone faris la homajn vizaĝojn per ombrolumo. Kaj la ĉefa esprimmaniero estas linioj. Tiel Jiang atingis novajn sukcesojn en la kampo de la ĉina figuropentrado.



Fuĝo (Parto) (Nuntempo) de **JIANG ZHAOHE**

Paŝtado (Nuntempo) de **WU BONIAN**






Ĝuo de muziko (Song-dinastio) de **ZHAO JI**



Moskeo Angaĝi de Tabriz, Irano — de **ŜAHROĤ FARZAD** (Irano)

## FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Pejzaĝo de Pakistano — de **SMAIL GRBO** (Jugoslavio)

